

Etnismo

N-roj 99-100 INFORMILO PRI ETNAJ PROBLEMOJ 31.12.2017



De Rusia Federacio:

la ĉuvaŝa lingvo

al Nov-Kaledonio:

sojle de sendependo

ĝis Suditalio:

verki per sia dialekto ...

EN TIU ĈI NUMERO:

- Eldona letero
p. 3
- La konsekvencoj de la
sovetia kaj rusia
lingvopolitikoj:
la ekzemplo de la ĉuvaŝa
p. 4 – 11
- Nov-Kaledonio/Kanakio:
ĉu sojle de sendependeco?
p. 12 – 21
- Verki per sia vilaĝa
dialekto p. 22 – 29
- Intervjuo de la vaŭda
kantisto *Lo Tian* p. 29 - 31
- Recenzo: Valora tekstaro
optimisma p. 32 - 33
- Koncize el... p. 33 - 34
- IKEL-informilo 79
p. 34 - 36.

Foto su la kovrilpaĝo

Fotis Hektor Alos iFont.

Ne malofte lernejoj bonvenigas lernantojn ĉe la ĉefa enirejo en la rusa kaj ĉuvaŝa. En tiu lernejo en tatar vilaĝo de suda Ĉuvaŝio estas aldonita la tatar. La oficiala nomo de ŝtata organizo, inkluzive de lernejo, devas laŭleĝe esti afiŝita en la du oficialaj lingvoj de Ĉuvaŝio, kaj neniam aperas en tria lingvo. Interne de la lernejoj skribaĵoj en la ĉuvaŝa estas esceptegaj kaj en la tatar preskaŭ nulaj.

Informilo pri etnaj problemoj

La membroj de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) ricevas *Etnismo*-n sen krompago, normale 2 kajerojn de minimume 36 paĝoj. Unuopa ekzemplero (de simpla numero kostas 5 €). La artikoloj publicitaj en *Etnismo* ne nepre esprimas starpunkton de IKEL, se ili ne estas subskribitaj ĝianome. Ĉiuj eroj de la "IKEL-Informilo" estas oficialaĵoj. La aŭtoroj ne ricevas honoraron. La redaktoro rezervas al si la rajton ne publikigi, mallongigi kaj lingve korekti kontribuojn.

ESTRARO:

PREZIDANTO: Alain FAVRE (savoĵano),
Damo de Vi, allée du Quart d'Amo 171,
FR-74140 Chens-sur-Léman, tel: ++33682093845,
retadreso: afavre1@hotmail.com;

VICPREZIDANTO KAJ REDAKTISTO:

Nicole MARGOT (vaŭdanino),
ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne
tel: ++ 41 21 653 14 67, retadreso: n.margot@bluewin.ch
SEKRETARIO: Nikolas XIL CARVALHO (asturleono),
48 postakutxa. 20400 Tolosa. Gipuzkoa. Eŭskio/EH
tel: ++ 34 630 44 68 63,
retadreso: fokomelo.makolji@gmail.com

KASISTO: Xabier RICO ITURRIOTZ (eŭsko),
Manuel Iradier, 22-1-ezk. ES-01005 Gasteiz
Euskal Herria-Eŭskio
retadreso: xabirico@outlook.com

RILATOJ KUN ESPERANTO-GAZETOJ. REVIZIADO:

István ERTL (hungaro), 22, rue Faulfiels
LU-7355 Helmdange, Luksemburgio,
tel. ++ 352 2633-2659, retadreso: istvan.ertl@gmail.com

ESTRARANO:

Hèctor ALÒS I FONT (kataluno), Mir pr. 15-55, RU-428024
Shupashkar, Ĉuvaŝio, Rusia Federacio
retadreso: h.alos@esperanto.cat

DUA REVIZIANTO (eksterkomitata): Nancy Fontannaz

RETEJO: www.etnismo.org

FORUMO: etnismo@googlegroups.com

KOTIZOJ KAJ KONTOJ:

Kotizoj	eŭroj
Normala	20.00
Subtenanta	30.00
Rabatita	10.00

La rabatitan membrecon rajtas ĝui ĉiu persono, kiu aŭ loĝas en (eks)socialisma aŭ "tria-monda" lando, aŭ estas studento aŭ emerito.

Bonvolu ĝiri vian IKEL-kotizon **ekskluzive** al la konto de IKEL ĉe UEA (kodo: **ikel-y**), UNIVERSALA ESPERANTO- (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam). Vi povas ankaŭ sendi retmesaĝon al tiu ĉi adreso: financoj@co.uea.org por pagi rekte el via UEA-konto.

Aliaj pageblecoj:

- BELGA poŝtgironto (pĝk) n-ro **000-1631831-97**
- GERMANA (Köln) pĝk n-ro **318291- 509**
BLZ 370 10050 IBAN:
DE51370100500318291509SWIFT PBNKDEFF
- NEDERLANDA pĝk n-ro **37 89 64** IBAN:
NL24PSTB0000378964, SWIFT PSTBNL21
- SVEDA pĝk n-ro **74374-0**
IBAN: SE9595000099604200743740,
SWIFT NDEASESS
- SVISA pĝk **12-2310-0** (Bulle)

Ĉiukaze indiku "ikel-y" kaj la celatan jaron. Bonvolu nepre certigi, ke via kompleta kotizo alvenu al la IKEL-konto: IKEL absolute ne povas transpreni kiajn ajn banko- aŭ peradkoston!

Perantoj:

- FRANCIO eblas sendi ĉekojn al Alain Favre. (Poŝtadreso ĉi-supre.)
- NORVEGIO Anne Karin Bondhus <akbondhus@jkn.no>
- KATALUNIO Víctor Solé <v.sole@esperanto.cat>

Eblas reklami en Etnismo!

Anonctarifo: (EUR): 1 p. 80, 1/2 p. 45, 1/4 p. 25, 1/6

Venonta redaktolimdato:
31-a de marto 2018

ELDONA LETERO

Etnismo pluvivas kaj brile koloras!

Kiel prezidanto de IKEL, do respondeculo pri la regula eldonado de *Etnismo*, mi devas pardonpeti pro la neapero de la numero 99 fine de la printempo. Nia redaktorino estis supersŝutita pro familia kialo – helpo al parenco en fino de vivo – kaj devis okupiĝi pri tiu malgaja kaj tempovora tasko dum pluraj monatoj. Ni do decidis aperiĝi numeron duoblan en la vintro. Kiel en tro da E-aj asocioj, nia laborkapablo estas tre limigita, ni estas malmultaj, neprofesiaj, kaj problemoj de unusola persono grave perturbas nian tutan funkciadon. Eble ankaŭ pri tio, ni devos paroli venontsomere en la UK en Lisbono, kiun espereble multaj membroj povos partopreni.

Tiu ĉi numero estas ankaŭ la 100a! Al ĉiuj asocioj mi devas danki pro tio, ke ili restis fidelaj aŭ alvenis kiel novuloj. Mi kompreneble alvokos ne nur al plua subteno, sed ankaŭ al sendo de artikoloj, eĉ mallongaj, ekzemple koncizaĵoj. Sed, kompreneble, pli longaj kontribuajoj tute bonvenas des pli, ke ni laŭcele strebas al pli profunda diskonigo de etnaj problemoj ol la ĝenerala gazetaro.

Por festi ĉi tiun 100an numeron, ni elektis publikigi ĝin plenkolora. Kaj nun kelkaj vortoj pri ties enhavo ... kaj ne-enhavo!

Ruslando kaj Francio estas ja tombejoj de etnoj. La unua longe pretendis ilin protekti, sed eĉ tradicie plej rezistemaj (precipe tjurkaj) popoloj ŝanceliĝas nun pro atakoj de prezidento-diktatoro, kies simpla vizito sufiĉas por ne plu apliki antaŭ longe akceptitajn leĝojn. Same paranoja, la franca ŝtato devas nun kalkuli kun rezisto de insulanoj, kiuj ne plu akceptas pasive ĉeesti detruon de ilia kulturo kaj aliigon de ilia vivmedio. Esperiga sinteno ankaŭ por multaj aliaj, ne nur insulogantaj.

Sed ĉu ni nun ne devas kultivi nian ĝardenon? Tion faris bazilikata verkisto kaj faras vaŭda rokmuzikisto, en la propra dialekto de sia malplimulta lingvo. La kialon – ne vere saman por ambaŭ – ili mem bone klarigas.

Ceteraj kontribuoj, kiujn vi certe plezure malkovros, pliigas la buntecon de nia revuo. Krom tio, ŝajne ne eviteblan temon ni ne traktis! Kiel multaj, la 1an de oktobro, ni estis ŝokitaj de la reago de hispanaj policistoj al katalunaj voĉdonantoj dum referendumo. Kaj ankaŭ de la subteno de diversaj eŭropaj respondeculoj, interalie *Macron* kaj *Merkel*, al tiaj frankismaj manovroj. Ilin hontigu la rezulto de la balotoj de la 21a de decembro en la Generalitato, en kiuj ilia ŝatata *Mariano Rajoy*, tra la loka filio de sia *Partido Popular*, (ricevinte nur 4,25 % de la voĉoj kaj 4 seĝojn, malgajninte 7 rilate la antaŭan asembleon) perdis plej grandan parton de la konfido ankaŭ de kataluniaj hispanemuloj. Anstataŭ favori dialogon la eŭropaj prezidentoj, kancelieroj ... iel ekstremisme apogis sensencan subpremon, kio ne plu devus okazi en nia epoko, sur (eĉ ne facile) integriĝanta kontinento. Oni akuzas etajn deliktulojn de antaŭurboj, ke ili uzas perforton, ĉar ili ne sukcesas uzi vortojn. Sed tio validas ankaŭ por grandaj naciŝtatoj, kiuj bombastas pri kulturaj, civilizaciaj atingoj sed tiom facile uzas siajn policon kaj armeon manke de diskutkapablo. Tristaj tropikoj, skribis fama etnologo antaŭ jardekoj. Trista Eŭropo, oni povus respondi.

Espereble en venonta numero de *Etnismo* ni publikigos studon pri la kataluna situacio, kiu povus paciĝi jam, se tiu bedaŭrinde ne fidinda *Rajoy* liberigus parlamentanojn de la Generalitato kaj ebligis al aliaj reveni hejmen sendanĝere.

Tio inter plej multaj (a)bondeziroj por la nova jaro 2018!

Alain Favre

La konsekvencoj de la sovetia kaj rusia lingvopolitikoj: la ekzemplo de la ĉuvaŝa⁽¹⁾

Akorde kun sia vasteco, Rusio estas unu el la plej multlingvaj ŝtatoj en la mondo, kun cento da aŭtoktonaj lingvoj el diversaj lingvofamilioj. Unu el la areoj kun la plej granda lingva diverseco estas la meza fluo de Volgo. Tie ses regionoj havas la statuson de “respubliko” kaj oficialigis malsamajn finn-ugrajn kaj tjurkajn lingvojn aldone al la rusa, kiu konstitucie estas oficiala lingvo tra la tuta Rusia Federacio. Ĉi-sekve mi skize prezentos la situacion de unu el ĉi tiuj lingvoj, la ĉuvaŝa, por kiu ĉi-junie la ret-atlaso de Unesko pri la endanĝeraj



El Vikimedia, Aŭtoro: Ezhiki, adaptita al Esperanto.

Situo de la Ĉuvaŝa Respubliko en la Rusia Federacio.

lingvoj de la mondo (2) ŝanĝis sian takson de “nesekura” al “sendube endanĝera”. Fakte, laŭ tiu fonto nur du rusiaj lingvoj ne estas endanĝerigitaj (la rusa kaj la tataro), dum 19 estas “nesekuraj”, 50 “sendube endanĝeraj”, 29 “grave endanĝeraj”, 23 “kritike endanĝeraj” kaj 14 malaperis de post 1950. Antaŭ ĉio, mi parolos pri la sovetia lingvopolitiko en la kampoj de planado de la korpuso, de la akiro kaj de la statuso. En la dua parto ni vidos, kiel la lingvaj ideologioj disvastigitaj en la sovetia epoko daŭre regas en la hodiaŭaj rusia politika diskurso kaj lingvopolitiko.

La ĉuvaŝa lingvo

La ĉuvaŝan lingvon parolas proksimume 1 miliono da homoj en vasta areo, esence inter la rivero *Sār/Sura* (ĉirkaŭ 600 km oriente de Moskvo) kaj Uralo. Laŭ la popolnombrado de 2010, ĝi estas la kvina plej parolata aŭtoktona lingvo en Rusio, post la rusa, tataro, baŝkira kaj ĉeĉena. Temas pri tjurka lingvo, same kiel la najbaraj tataro kaj baŝkira, tamen tjurkologoj konsideras ĝin la plej diverĝa el ĉiuj tjurkaj lingvoj kun diversaj trajtoj malsamaj al ĉiuj aliaj lingvoj de la familio (3).

En la lasta triono de la 19a jc. la ĉuvaŝa ricevis skriban normon rezulte de la cara politiko kristanigi aŭ plifortigi la antaŭnelongan kristanigon de iuj popoloj de la areo. Komence de la sovetia epoko oni strekis la nuntempe plu validajn internajn limojn de



El Vikimedia. Aŭtoro: Bestalex. Adaptita al Esperanto.

Volgio esence surbaze de etnaj kriterioj, kvankam la popolmiksado tre malfaciligis tion. Ĉuvaŝio estis difinita kiel relative malgranda regiono (18 000 km²), etne kompakta (78% de la loĝantaro estis ĉuvaŝoj), sed ĉirkaŭ 40% de la ĉuvaŝoj restis ekster ĝiaj limoj. Hodiaŭ, laŭ la popolnombrado de 2010, 68% de la loĝantaro de Ĉuvaŝio estas ĉuvaŝoj, 27% rusoj, 3% tataroj; 43% de la rusiaj ĉuvaŝoj loĝas ekster Ĉuvaŝio.

La 1920ajn jarojn karakterizis politikoj de pozitiva diskriminacio favore al la naciaj malplimultoj kaj iliaj lingvoj, situacio kiu inversiĝis meze de la 1930aj jaroj. La dulingvigo en la rusa de la naciaj minoritatoj kaj la subpremo de ajna suspektata naciismo alia ol la ŝtate disvastigata fariĝis la pilieroj de la politiko pri lingvoj kaj popoloj de Sovetio. Rilate al la korpus-planado de la minoritataj lingvoj, komenciĝis politiko de amasa interferado de la normaj lingvoj pere de la grandskala aldono de rusaj vortoj preskaŭ sen iu ajn adapto, ĉu ortografia, ĉu fonetika. Tio plene aliigis la fonologian bazon de la lingvoj, kaj havis profundajn sekvojn en ilia morfologio kaj sintakso (4). Rilate al la akir-planado, post la edukreformo fine de la 1950aj jaroj, en la Rusia Soveta Federacia Socialisma Respubliko la instruado en la minoritataj lingvoj konserviĝis nur por la plej multe parolataj, nur en la interno de kelkaj respublikoj kaj ĝi estis preskaŭ plene flankenpuŝita al la vilaĝoj kaj al la kvar jaroj de la elementa lernejo. Oni tamen plu funkciigis universitatajn studojn por formi certan nombron da profesiuloj de la ĉuvaŝa (kaj aliaj lingvoj de la t.n. “titularaj” popoloj de la koncernaj respublikoj) en la kampoj de la instruado, teatro, ĵurnalismo ktp. Rilate al status-planado, oni disvastigis la ideologion de la rusa kiel la sola leĝitima lingvo de komunikado inter malsamlingvanoj. Sekve, la rusa iĝis la sola leĝitima lingvo en la urboj kaj duonurbaj vilaĝoj, en kiuj oni ne nur forpelis la ĉuvaŝan el la instruado, sed oni ankaŭ rekomendis al la gepatroj ne paroli en ĝi al la gefiloj kaj nemalofte admonis homojn uzantajn ĝin surstrate aŭ en vendejoj. Samtempe, oni ŝajnis subtenadon al la lingvo, kantante popolkantojn en ĉiu ajn aranĝo, apogante ĉuvaŝan nacia teatron, gazetaron en la ĉuvaŝa, iom da literaturo, iun operon ktp. Entute, la sovetia lingvopolitiko havis signifajn diferencojn kun tiu farata ĝis almenaŭ la 1970aj jaroj en la plimulto de okcidenta Eŭropo. En Sovetio oni ne primokis malferme minoritatajn lingvojn, kaj malofte neis ilian lingvecon. Dum oni vartis ilin kiel identigilojn, kiel naciajn simbolojn, oni samtempe igis ilin plene senfunkciaj por la moderna, urba vivo.

El demografia vidpunkto, la industriigado kaŭzis amasan migradon de vilaĝanoj al la urboj (kaj ankaŭ

de unu regiono en alian). En Ĉuvaŝio, kie en 1926 0,6% de la ĉuvaŝoj loĝis en urboj, en 1989 46,5% de ili estis urbanoj. Plej ofte, la naskitoj urbe ne parolis ĉuvaŝe aŭ, se ili iagrade lernis ĝin (tipe, dum ili somerumis ĉe la geavoj en la vilaĝo), ili ne transdonis ĝin al la sekva generacio. En la vilaĝoj la ĉuvaŝa konserviĝis, sed ekster Ĉuvaŝio, Tatario kaj Baŝkirio, ĝi klare regresis eĉ en la kamparaj regionoj, i.a. ĉar la lerneja instruado en la ĉuvaŝa estis preskaŭ plene likvidata en la 1960aj ekster la respublikoj.



Foto de la aŭtoro.

En du hiperbazaroj en la periferio de Ŝupaŝkaro estas uzata la ĉuvaŝa lingvo por informado al klientoj. Rimarkinde temas pri entreprenoj kun sidejo ekster Ĉuvaŝio. Tiaj informiloj ekzistas en neniu loka vendejo aŭ publika administraciejo.

La esperoj de perestrojko

Kun la alveno de perestrojko lingvaj demandoj fariĝis unu el la plej akraj temoj de la diskutoj. En 1990 la Deklaro de Suvereneco aprobita de la parlamento de Ĉuvaŝio starigis la ĉuvaŝan kaj la rusan kiel oficialajn lingvojn (ĝis tiam, jure neniuj lingvoj havis tiun statuson). La saman jaron oni aprobis la unuan lingvoleon por la respubliko kaj en 1993 programon por ĝia realigo. La instruado de la ĉuvaŝa fariĝis deviga en la lernejoj, oni planis vastigi ĝin uzon kiel lingvon de instruado (kaj en la urboj, kaj en la mezlerneja instruado), ĝia uzo fariĝis deviga en ĉiuj signoj rilataj al loknomoj, estis postulite, ke ene de 10-jara periodo ĉiuj ŝtataj funkciuloj fariĝu dulingvaj ktp. Ĉion ĉi kompreneble akceptis kun granda singardemo la ruslingva loĝantaro. Tamen la rusia ekonomio kolapsis, la plimulto da fabrikoj fermiĝis, la kolĥozo estis dissolvitaj, la inflacio galopis. La nova prezidanto de Ĉuvaŝio, same kiel la plimulto de la loĝantaro, ekhavis aliajn prioritatojn. Post kelkaj jaroj el la tuta leĝo restis, esence, la deviga lerneja instru-



Foto de la aŭtoro.

“Centro de defendo de la rajtoj de la civitanoj” de la partio Justa Rusio, en kiu ĉiuj afiŝoj senescepte estas ekskluzive en la rusa lingvo.

ado de la ĉuvaŝa kaj iuj ŝildoj sur la stratoj: tiuj kun la stratnomoj, tiuj de la urba transporto kaj tiuj kun oficialaj nomoj de institucioj. Krome, kvankam en la plej multaj urboj la dulingvaj ŝildoj kun la nomoj de la stratoj kaj bushaltejoj iĝis la normo, ili tamen ne fariĝis vere universalaj, malgraŭ la daŭra leĝa devigo.

La esenca problemo kuŝas en tio, ke la lingvaj ideologioj ne ŝanĝiĝis. La aŭtoritatoj montras neniun signon de malestimo por la ĉuvaŝa, kaj tre verŝajne tio ne nur estas ŝajnigo. Tamen ili ne vidas pli da funkcioj por la ĉuvaŝa en la publika sfero ol kelkajn simbolajn. Malgraŭ ke temas pri oficiala lingvo, parolata kiel denaska de proksimume duono de la loĝantaro, kaj ke la civitanoj rajtas turni sin al la aŭtoritatoj en la ĉuvaŝa kaj ricevi respondon en ĝi, ne ekzistas iu ajn informo en iu ajn registara oficejo en la ĉuvaŝa (krom foje la horaro de akceptado de civitanoj), kaj mi neniam vidis dulingvan administran formularon. Ne surprizas, sekve, ke laŭ enketoj la medio, en kiu la uzo de la ĉuvaŝa estas la plej malofta, estas ĝuste la interrilato de la civitanoj kun la administracio (sed la aŭtoritatoj eltiras el tiuj regule aperantaj donitaĵoj neniun konkludon pri sia propra efiko al tio). La studo de la lingva pejzaĝo indikas, ke en Ŝupaŝkaro, la ĉefurbo de la Ĉuvaŝio, en kiu 63% de la loĝantoj estas etne ĉuvaŝaj, nur ĉirkaŭ 2% de la strataj afiŝoj kun reklamoj de oficialaj instancoj aŭ organizaĵoj estas en la ĉuvaŝa, ke la ĉuvaŝa en la loknomoj en la afiŝoj de la ŝoseoj (deviga de antaŭ pli ol 25 jaroj) havas similan oftecon, ke la ret-paĝoj de la oficialaj organizaĵoj en la ĉuvaŝa (laŭ mia tre proksimuma takso) estas malpli ol 1%.

Instruado

Praktike, la sola vivosfero, en kiu oni iom favoras la ĉuvaŝan, estas edukado. La problemo kuŝas en tio, ke la aŭtoritatoj ne scias, al kio la lingvo utilas. La dokumento (5) difinanta la strategiajn liniojn de la instruado en Ĉuvaŝio preskaŭ ne tuŝas la ĉuvaŝan, kontraste kun la fremdaj lingvoj, kaj ne inkludas ĝin kiel elementon por atingi la deklaritan celon kreskigi plurlingvecon. La ĉuvaŝa ŝajnas esti konsiderita pli ĝuste kulturajo aŭ simbolo ol lingvo. La instrusistemo diferencigas inter du tipoj de lernado de la ĉuvaŝa: kiel denaska aŭ nendenaska (“ŝtata”) lingvo. Laŭ la unua oni instruas en la plimulto de la vilaĝoj, dum kiel nendenaska lingvo tio okazas en ĉiuj

lernejoj de la urboj kaj vilaĝoj kun pli ol 5000 loĝantoj (kaj ankaŭ en ne malmultaj vilaĝoj kun pli ol 1000 loĝantoj). La instruado de la ĉuvaŝa kiel nendenaska lingvo estas orientita al la neformala interparolado; skribadon oni konsideras seninteresa. Krome, en tiu formo de instruado la klasoj ne malofte okupiĝas pri la ĉuvaŝaj tradicioj kaj kulturo, flankenlasante la lingvon.

Ekstreman kazon mi renkontis en apud-urba vilaĝa lernejo (3400 loĝantoj, 90% ĉuvaŝoj), en kiu la klasoj de la ĉuvaŝa (kiel nendenaska lingvo) okazis en la lerneja muzeeto, kiu plenplenis de tradiciaj kostumoj kaj malnovaj agrikulturaj iloj. Tamen, la konfuzo inter lingvo kaj kulturo evidentas en la instruado de la ĉuvaŝa en la du lastaj jaroj de la lernejo. Tiam oni lernas ne la lingvon, sed la literaturon. Tio ne estus esenca diferenco, se en la lernejojn, kie oni instruas la ĉuvaŝan kiel nendenaskan lingvon, oni ne estus enkondukinta fine de la 2000aj jaroj plene ruslingvan lernolibron kun nur tradukoj. Instruisto en distrikta centro (4000 loĝantoj), kiun mi intervjuis, klarigis, ke li daŭrigis la uzadon de la malnova lernolibro kun originalaj tekstoj, ĝis la instru-inspektistoj strikte malpermesis tion al li. Laŭ mia esploro en tiu ĉi lernejo, el 49 enketitoj, lernantoj de la lastaj du lernojaroj, 40 diversgrade parolis ĉuvaŝe hejme (la lernejo tamen ne proponis lernadon de la ĉuvaŝa kiel denaska lingvo). La sistemo ne nur plene neglektas la lingvajn sciojn de la lernantoj, kaj tute ne plibonigas ilin, sed eĉ kontraŭis la ĉuvaŝan leĝaron, kiu devigis la instruadon de la ĉuvaŝa lingvo.

Aliflanke, ŝajne por eviti la iagradan konstruaŭstaron kontraŭ la deviga instruado de la loka kunoficiala lingvo ekzistantan en Tatarstano kaj Baŝkortostano, en Ĉuvaŝio oni atingis silentan interkonsenton kun gepatroj kaj lernantoj: oni, kutime, tre malmulte postulas de la lernantoj pri la ĉuvaŝa. Krome, en septembro 2017 oni lernas ĝin kiel nendenaskan lingvon nur 1–3 horojn semajne (la tendenco estis al iom-post-ioma reduktiĝo de tiuj horoj, kiel plej klare okazis en ĉiuj elitaj lernejoj de Ŝupaŝkaro, tamen la ordono de *Putin* de aŭgusto 2017 – vidu poste – antaŭvideble plirapidigos la procezon). Rezulte, enketo farita al 589 lernantoj de la du lastaj jaroj de 26 lernejoj el 8 urboj indikas ke, kvankam la ĉuvaŝan ili lernis dum 9–10 jaroj, 15,1% tute ne komprenas ĝin kaj pliaj 26,5% “iom” komprenas. (Rimarkindas, ke la rezultoj povas ankaŭ speguli nepozitivan sintenon de parto de la lernantoj pri la ĉuvaŝa. Tio igus ilin subtaksi siajn sciojn; faktaj lingvokonaj ne estis testitaj. Tamen tia sinteno oficiale ne ekzistas aŭ estas konsiderata neglektinde malofta.)

Kion fakte celas la lernejoj?

La lernejoj, fakte, ne havas kiel celon plifortigi la lingvan konscion de la lernejoj aŭ des malpli modifi la socian uzadon de la lingvoj favore al la ĉuvaŝa. Male, ili estas institucioj plifirmigantaj la establitajn lingvan hierarkion. Praktike ĉiuj afiŝoj kaj informoj en la lernejoj, eĉ en la vilaĝoj, estas en la rusa (krom foje bonveniga afiŝo ĉe la ĉefpordo de la lernejo kaj fojfoje dulingvaj ŝildoj sur la pordoj de la klaŝĉambroj). Paroli ruse interne de la lernejoj estas la normo, krom en la malgrandaj vilaĝoj. Tiel, laŭ enketo al 264 lernantoj de la lernejoj de du distriktaj centroj (ambaŭ 5000 loĝantoj), 20% parolis nur ruse hejme, 50% tiel faris kun la samklasanoj kaj 70% kun la instruistoj. Tiuj rezultoj i.a. montras, ke eĉ la instruistoj pri la ĉuvaŝa parolas ruse kun ĉuvaŝlingvaj lernantoj.

La instruado en la ĉuvaŝa estas denove reduktita, kiel en la sovetia epoko, al la vilaĝoj (kun ne pli ol 2500 loĝantoj) kaj al la kvar jaroj de la elementa lernejo. Ĝi krome malkreskas, ne nur pro la laŭgrada malpliigo de la vilaĝa loĝantaro kaj la koncentriĝo de la lernantoj en pli grandajn lernejojn, sed ankaŭ ĉar iom post iom la vilaĝaj lernejoj transiras al la instruado en la rusa. Laŭ donitaĵoj de la ĉuvaŝa ministerio pri edukado, la vilaĝaj infanoj lernantaj la kvar unuajn lernejarojn en la ĉuvaŝa malkreskis de 70,1% en 2008 al 55,0% en 2015. Samtempe la nombro de studhoroj de la ĉuvaŝa reduktiĝis kaj en la

kamparaj lernejoj kaj en la urbaj, parte pro la leĝaj ŝanĝoj je la federacia nivelo. (6) Mi intervjuis dekojn da instruistoj, kaj el iliaj vortoj evidentiĝas, ke ĉefa kaŭzanto de ĉi tiuj procezoj estas la ŝanĝoj en la rusia edukistemo meze de la unua jardeko de la 21a jc, kiuj plifortigis la gravecon de la rusa lingvo en la studprogramoj kaj donas neniun valoron al la studo de la minoritataj lingvoj. Al la sama konkludo alvenis aliaj esploristoj studintaj aliajn regionojn (7). Tiel, la enkonduko en 2016 de federacia ekzameno en la rusa fine de la elementa lernejo levis protestojn, ĉar ĝi estas nova signalo por lernantoj, gepatroj kaj instruistoj pri la manko de valoro de la minoritataj lingvoj en la rusia edukistemo.



Foto de la aŭtoro.

«Ni konservu la gepatran lingvon kaj la nacian kulturon por la prafiloj». Ruslingva afiŝo en vilaĝa lernejo en Ĉuvaŝio.

Recentrizo

Fakte, surfone de tre negativa dinamiko, kiun trenis la ĉuvaŝa ekde la sovetia tempo, la tendencoj plimalboniĝis rezulte de la recentralizo de Rusio ekentreprenita de prezidento *Putin* tuj post sia unua enposteniĝo en 2000. Al tio aldoniĝas la fiksa ideo de la aŭtoritatoj pri la neceso plifortigi la lingvan hierarkion, en kiu ĉepinte staras la rusa, al kiu oni atribuas esencan ŝtat-kunigan rolon. La rusa ekhavis specialan federacian leĝon kaj regulajn ŝtat-programojn por sia protekto, dum daŭre mankas analogaj leĝoj kaj programoj por la aliaj lingvoj. Signifoplene, la informoj pri la popolnombro havas pli da informoj pri la rusa ol pri la ceteraj lingvoj. Ekzemple en la lasta parta popolnombro de 2015, kies esencaj donitaĵoj por Ĉuvaŝio aperis en aprilo 2017, el la 11 lingvo-rilataj tabeloj 8 enhavas informojn nur pri la rusa lingvo, dum en 3 estas informoj ankaŭ pri aliaj lingvoj, i.a. la ĉuvaŝa. (8) Rimarkindas, ke tiu zorgo por la rusa en Ĉuvaŝio okazas por lingvo, kiun regas 99% de la loĝantaro kaj

kiu larĝege dominas en la socio.

Inter la centrizaj agoj entreprenitaj en la fruaj 2000aj jaroj apartan gravecon havis la limigo de la ekonomia aŭtonomio de la regionoj. Konsiderante, ke la kostoj de la lingva politiko, interalie en la instruado, ŝarĝas ekskluzive la regionojn, praktike nur riĉaj respublikoj kiel Tatarstano, Baŝkortostano aŭ Saĥio (9) permesis al si kovri la kostojn de instruado en minoritataj lingvoj en la urboj kaj en mezlernejo. La rusiaj aŭtoritatoj, male, taksis “fermita lingva medio” la lernoprogramojn de lingva mergado en minoritatajn

lingva unueco de la ŝtato, plifortiĝo de socia stratumiĝo kaj kresko de streĉiĝo, kiu estas rekta minaco al la nacia sekureco”. La dokumento vidis en la dulingva instruado ankaŭ kaŭzon de malpli bonaj rezultoj en la instruado de la rusa, sekve rekomendis la ekskluzivan aŭ plimultan uzadon de la rusa en la lerneja kaj antaŭlerneja instruado ĉie en Rusio. Tamen, mankas sciencaj studoj subtenantaj ĉi tiujn supozojn. Male, esploroj en Tatarstano (12) kaj Ĉuvaŝio (13) indikas, ke la dulingvuloj atingas egalajn aŭ pli bonajn lerneajn rezultojn ol la unulingvuloj, eĉ



Foto de la aŭtoro.

En oktobro 2014, kelkajn tagojn antaŭ la vizito de prezidento *Putin* al Ŝupaŝkaro, ĉiuj trolejbus-haltejoj en la centraj stratoj, kiujn li devis trairi, estis unulingvigigitaj en la rusan (eĉ kun ortografiaj eraroj kiel ĉi tie). Post la prezidenta vizito, danke al la premo de inteligencianoj kaj aktivuloj, denove estis metitaj dulingvaj afiŝoj. La fona reklamo estas de internacia sporta konkurso. La reklamoj de tiu ĉi aranĝo, faritaj de la lokaj aŭtoritatoj, estis ekskluzive en la rusa kaj angla lingvoj.

lingvojn, komencitajn en manpleno da lernejoj de finnugra-lingvaj respublikoj kaj analogajn al mergoprogramoj en multaj landoj. (10) Simile, malneto de oficiala strategia gvidilo por la instruado de la rusa lingvo, (11) aperinta en 2015 kaj diskutita en ĉiu rusia lernejo, asertis, ke la ekzisto de pli ol 4000 lernejoj en Rusio, kie la rusa ne estas la sola lingvo de edukado, “neeviteble kondukos al situacio de perdo de

en la rusa (14).

Senrigarde al tio, en altnivela kunveno en julio 2017 prezidento *Putin* deklaris, ke “devigi homon lerni lingvon, kiu ne estas por li denaska, estas neakceptebla, same kiel redukti la nivelon kaj tempon de instruado de la rusa” (15) Tio kompreneble ne celis la devigan lernejan instruadon de fremdaj lingvoj, sed nur tiun de la rusiaj minoritataj lingvoj. Konsekvence

ШУПАШКАР ХУЛА АДМИНИСТРАЦИИ
САПАМПАТЬ

Сенё сұл Яңһе!

2017

Дадь тһеһ, кһтһ верить в волшебство!



Fonto: <http://nk.cap.ru/?id=10356>

Devio-vojo al la vilaĝo Kivsert Yenëŝ/Kivsert-Janŝevo. La distrikta administracio rifuzis la dulingvigon de tiu ĉi afiŝo pretekste, ke temas pri trafik-indiko pri rapideco ĝis 60 km/h.

Kaj en unu bus-stacio de la ĉefurbo, foje ili ricevas rifuzon. Rilate al la voj-indikantaj tabuloj la respondoj estas kutime negativaj. Oni regule pretekstas, ke ne estas leĝa devigo (malgraŭ la miaopinie klara devigo en la lingvoleĝo pri dulingveco de la loknomoj), kaj foje la motivoj vekas miron (vidu bildon). Rimarkindas, ke *Irëkleh* tre ofte ricevas respondojn de la administraciaj organoj en la rusa, malgraŭ ke ĝiaj petoj estas skribitaj en la ĉuvaŝa, kaj la leĝo postulas (krom en esceptaj okazoj) respondon en la lingvo de la peto.

Al plua rusiĝo

El ĉio ĉi rezultas, ke la lingva rusiĝo en la urboj de Ĉuvaŝio neniel malfortiĝas. La lingvon de komunikado kun la gefiloj daŭre decidas la lingvaj antaŭjuĝoj disvastigitaj en la sovetia epoko.

Aliaj samtemaj artikoloj jam aperintaj: *Etnismo* n-ro 88: Daniele Vitali: “Vojaĝo al centro de Rusio”, p. 2-8. Kaj de Hektor Alos i Font, samnumere: “Longe tiu sistemo ne eltenos” p. 9-11, “Revigliĝo en Mareio” p. 12-14, “Surprizaj nombroj pri etnoj kaj lingvoj en Rusio”, ĉiuj legeblaj je: http://www.etnismo.org/arkivo/Etnismo_88.pdf

Notoj:

- (1) Tiu ĉi artikolo estas pilargigita kaj aktualigita versio de katalunlingva kontribuaĵo en la blogo de la revuo pri lingvopolitiko kaj socilingvistiko *Revista de Llengua i Dret/Journal of Language and Law*, <http://eapc-rld.blog.gencat.cat/2017/06/08/les-consequencies-de-les-politiques-linguistiques-sovietica-i-russa-lexemple-txuvaix-hector-alos-i-font/>
- (2) <http://unesco.org/languages-atlas/>
- (3) Vidu ekzemple Johanson, Lars; Csató, Éva Ágnes. *The Turkic Languages*. London; New York: Routledge, 2006.
- (4) Alòs i Font, Hèctor. “L’ortografia txuvaixa en els anys vint i trenta: un exemple dels canvis en la política lingüística soviètica i les seves conseqüències”. *Kataluna Esperantisto*, 366, 2016, p. 24–46.
- (5) “O Strategii razvitija obrazovanija v Ĉuvaŝskoj Respublike do 2040 goda”. Dekreto (en la rusa lingvo) de la Prezidanto de Ĉuvaŝio de la 25a de marto 2008. http://gov.cap.ru/laws.aspx?gov_id=49&id=52926
- (6) Chevalier, Joan F. “School-Based Linguistic and Cultural Revitalization as a Local Practice: Sakha Language Education in the City of Yakutsk, Russian Federation”. *Nationalities Papers*, 45(4), 2017, p. 613-631. doi: 10.1080/00905992.2016.1275534. Alòs i Font, Hèctor. “Škol’naja uspevajemost’ dvujazyčnyx detej (analiz opyta proektnyx

Intervjuitaĵ ĉuvaŝlingvaj gepatroj ankaŭ mencias la unulingvajn (ruslingvajn) infan-ĝardenojn, lernejojn kaj sanservon kiel kaŭzojn de sia lingvoelekto. (18) Krome, kiel pruvite en diversaj esploroj en Ĉuvaŝio, la edukado tute aŭ plimulte en la rusa plifortigas ĝian uzon en la familioj. (19) Malpli ol 1% de la urbaj lernejoj asertas paroli precipe en la ĉuvaŝa hejme kun la gepatroj. En la stratoj kaj en la publika transporto de Ŝupaŝkaro oni ne aŭdas gepatrojn aŭ geavojn paroli kun la infanoj en la ĉuvaŝa, kvankam ĉuvaŝoj konsistigas ĉirkaŭ 62% de ĝia loĝantaro. Intervjuoj kun gepatroj indikas, ke en la publika spaco ili ofte preferas paroli en la rusa kun la infanoj. Laŭ mia esploro, entute la ĉuvaŝa aŭdiĝas nur en 8% de la personaj

interparoloj en la publika spaco de Ŝupaŝkaro; la ĉuvaŝparolantoj averaĝe estas 15–20 jarojn pli aĝaj ol la rusparolantoj. En la vilaĝoj la enketoj montras, kiel la procezo de lingva rusiĝo komenciĝis en la 90aj jaroj, ĉefe en la plej grandaj kaj en la distriktoj plej proksimaj al la ĉefurbo. Estas probable, ke la kolapso de la kampara ekonomio, bazita dum la sovetia epoko sur la kolĥozoj, rapidigis procezon, kiu estis antaŭvidebla.

Neeviteble, la ĉuvaŝa perdos konsiderindan nombron da parolantoj en la venontaj jardekoj. Malgraŭ la novaj NROj laborantaj por la ĉuvaŝa, ne estas nun signoj permesantaj esperi bremsiĝon de la lingva rusiĝo en la proksima estonteco. Male, la malfortiĝo de la ĉuvaŝa en la instrusistemo igas prognozi plirapidiĝon de la lingvo-anstataŭado.

HAiF

- klassov g. Ĉeboksary)". *Vestnik ĉuvaŝskogo gosudarstvennogo pedagogičeskogo universiteta* 89(1), 2016, p. 3-12. Rimarkindas, ke ankaŭ la kontraŭstaro kontraŭ la deviga instruado de la tatara organiziĝis kaj kreskis tuj post la ŝanĝoj en la federacia instrupolitiko en 2007 (vd: Maximova, Olga; Belyaev, Vladimir; Laukart-Gorbacheva, Olga. "Transformation of the System of Bilingual Education in the Republic of Tatarstan: Crossover Ethnolinguistic Controversies". *Journal of Social Studies Education Research* 8, no. 2 (2017): 15-38. doi: 10.17499/jsser.78455).
- (7) Chevalier, Joan F. "Multilingual Education in South Siberia: National Schools in the Republics of Altai and Tyva". *Heritage Language Journal* 9(2), 2012, p. 1-9. Chevalier, Joan F. "School-Based Linguistic and Cultural Revitalization as a Local Practice..." *verko cit.* Prina, Federica. *National Minorities in Putin's Russia: Diversity and Assimilation*. London; New York: Routledge, 2016. Protassova, Ekaterina. "Multilingual Education in Russia". En: Lähteenmäki, Mikka; Vanhala-Anisewski, Marjatta (red.). *Language Ideologies in Transition: Multilingualism in Russia and Finland*. Frankfurt am Main: Peter Lang, p. 155-174. Zamyatin, Konstantin. "The Education Reform in Russia and Its Impact on Teaching of the Minority Languages: An Effect of Nation-Building". *Journal on Ethnopolitics and Minority Issues in Europe* 11(1), 2012, p. 17-47.
- (8) http://chuvash.gks.ru/wps/wcm/connect/rosstat_ts/chuvash/ru/census_and_researching/census/microcensus_2015/score_2015/
- (9) PIV: Jakutio. La radiko "saĥ-" ekzistas en la Esperantlingva Etnonoma Glosaro de IKEL, en la oficiala nomo de la Respubliko kaj ĝi estas ankaŭ la formo preferata de la etnanoj.
- (10) "Report submitted by the Russian Federation pursuant to article 25, paragraph 1 of the Framework Convention for the Protection of National Minorities. Received on 9 April 2010". <http://rm.coe.int/168008b7c3?page=102>.
- (11) <http://edu.crowdexpert.ru/files/Концепция%20РЯИЛ.pdf>
- (12) Tovar-García, Edgar Demetrio; Alòs i Font, Hèctor. "Bilingualism and Educational Achievements: The Impact of the Language Used at Home by Tatar School Students in Tatarstan, Russia". *Journal of Multilingual and Multicultural Development*, 38(6), 2017, p. 545-557. doi:10.1080/01434632.2016.1213847.
- (13) Alòs i Font, Hèctor. "Proekt koncepcii prepodavanija russkogo jazyka i literatury i vopros škol'noj uspevaemosti detej". En: Egorova, Anna S. (red.). *Aktual'nye voprosy issledovanija i prepodavanija rodnym jazykov i literatur*. Ĉeboksary: Novoe Vremja, 2016, p. 33-37. Alòs i Font, Hèctor. "Škol'naja uspevajemost'..." *verko cit.*
- (14) Ankaŭ esploristoj de la Rusia Akademio de Sciencoj rimarkas, ke en la ses respublikoj de la Volga Federacia Distrikto la rezultoj pri la rusa lingvo en la abiturienta ekzameno estas egalaj al tiuj de la aliaj regionoj de la sama distrikto, kvankam la procento de denaskaj ruslingvanoj en la unuaj estas klare malpli alta ol en la duaj (Tishkov, Valerij A.; Stepanov, Valerij V. "Interethnic Relations and Ethnocultural Education in Russia". *Herald of the Russian Academy of Sciences* 87(5), 2017, p. 416-425. doi:10.1134/S1019331617050082).
- (15) <http://ria.ru/society/20170720/1498850306.html>
- (16) <http://kremlin.ru/acts/assignments/orders/55464>
- (17) http://bashprok.ru/the_prosecutor_explained/razyasnenie-zakonodatelstva/razyasnit-vopros-obyazatelnosti-izuch.php
- (18) Alòs i Font, Hèctor. "Jazyki obščeniĵa v semjakh molodyx ĉuvaŝej (po rezul'tatam interv'ju s molodymi roditeljami)". En: Il'ina, Nadežda G. (red.). *Aktual'nye voprosy istorii i kul'tury ĉuvaŝskogo naroda. Vyp. 3*. Ĉeboksary: Ĉuvaŝskij gosudarstvennyj institut humanitarnyx nauk, 2015, p. 202-232.
- (19) Alòs i Font, Hèctor. *Prepodavanie ĉuvaŝskogo jazyka i problema jazykovogo povedeniĵa roditelej*. Naučnye doklady 20. Ĉeboksary: Ĉuvaŝskij gosudarstvennyj institut humanitarnyx nauk, 2015. Alòs i Font, Hèctor. "The Chuvash Language in the Chuvash Republic: An Example of the Rapid Decline of One of Russia's Major Languages". En: Sloboda, Marián [et al.] (red.). *Sociolinguistic Transition in Former Eastern Bloc Countries: Two Decades after the Regime Change*. Frankfurt am Main: Peter Lang, 2016, p. 51-73. Alòs i Font, Hèctor. "Izmenenie jazykov obščeniĵa ĉuvaŝskix i tatarskix škol'nikov južnyx rajonov Ĉuvašii". Aperonta en *XVII Ignat'evskie čtenija*, Joŝkar-Ola.



Foto: Massimo Ripani.

Informaj afiŝoj en la ĉuvaŝa maloftas kaj preskaŭ ĉiam ili estas rezulto de la 1990aj jaroj aŭ de plendoj de civitanaj organizaĵoj. Escepto estas freŝdataj afiŝoj pri parkado-pagado en ŝupaŝkaro. Tamen la instrukciojn en la ĉuvaŝa oni ĉie metis en la flanko kontraŭa al tiu, kie oni pagas, sekve ili praktike senutilas.

Nov-kaledonio/Kanakio: ĉu sojle de sendependado?

Enkonduko

Ne ofte oni parolas pri la listo de ne-aŭtonomaj, alivorte malkoloni-endaj teritorioj starigita de Unuiĝintaj Nacioj. Entute ĝi entenas nur 17 teritoriojn, kion fakuloj pri etnaj kaj naciaj rajtoj foje akre kritikas. Oni tamen devas agnoski, ke organizo kiel UN, kiu fakte baziĝas sur ŝtatoj, ne senkuraĝe publikigis tiun liston. Tiom pli, ke preskaŭ ĉiuj el tiuj teritorioj dependas de potencaj ŝtatoj, membroj de la Konsilio pri Sekureco de UN. Fakte plej multaj el tiuj landoj estas sub brita aŭ usona regado. Francio havas du, ambaŭ situantajn en Pacifiko, nome Polinezio (vidu *Etnismo*-n no 85 (1) kaj Nov-Kaledonion.

Ni notu, ke UN ne nepre petas, ke tiuj teritorioj iĝu plene sendependaj, ili povas ankaŭ havi nur apartan statuson kadre de la “metropola” ŝtato, aŭ fariĝi “asociita ŝtato” de tiu lasta. Necesas entute, ke la loĝantaro plendemokratie akceptu tian statuson.

Antipode de Parizo

Nov-Kaledonio malfacile povus esti pli for de sia “metropolo”: tiu insularo ja troviĝas en okcidenta parto de Pacifiko, je 17 000 km de la eŭropa Francio. Norde estas Vanuatuo, eksa brit-franca kolonio, nun sendependa. Aŭstralio kaj Nov-Zelando troviĝas je pli ol 1 400 km, respektive okcidente kaj sude. Oriente estas la Fiĝia insularo, ankaŭ eks-brita kolonio.

La plej granda insulo de tiu ĉi teritorio estas nomata Granda Tero. Longa 400 km de nord-okcidento al sud-oriento kaj larĝa maksimume 64 km, ĝi reprezentas 88% de la 18 575 km² de la insularo. Oriente de Granda Tero, iom paralele, liniigas la Lojalecaj insuloj, tio estas, de nord-okcidento al sud-oriento, *Ouvéa*, *Lifou* kaj *Maré*. Tutsude de la arkipelago, la Pina insulo aparte famas pro siaj plaĝoj. Al tio oni devas aldoni insuletojn kaj rifojn foje sufiĉe forajn kaj ne loĝatajn.



El Vikimedia. Aŭtoro: Eric Gaba. Adaptita al Esperanto.

Nov-Kaledonio.



El Vikimedia. Aŭtoro: TUBS. Adaptita al Esperanto.

Situo de Nov-Kaledonio.

Nun vivas 270 000 homoj en la tuta insularo. Ilia malsama deveno kaj la fakto, ke iu nova grupo (koloniantoj) kaptis la povon super la “unuaj alvenintoj”, kaŭzas de longe konfliktojn ofte tre akrajn, kies solvo postulas drastajn politikajn decidojn.

Kanakoj

En la havaja *kanaka* signifas (liberan) homon, kaj la termino disvastiĝis dum la 19a jarcento al diversaj loĝantoj de Oceanio; poste oni limigis ĝin al melanezianoj kaj pli kaj pli al tiuj, kiuj vivas en Nov-Kaledonio. En la franca la vorto *canaque* ne estis aparte valoriga sed, dum la sepdekaj jaroj de la lasta jarcento, melaneziaj aktivuloj fiere adoptis la vorton *kanak* por si mem kaj kreis la vorton *Kanaky* por sia lando. Efektive Kaledonio estas tre malnova nomo por (parto de) Skotlando; la fama kapitano *James Cook* donis la nomon Nov-Kaledonio al la ĉefa insulo ŝajne pro simileco kun la skota marbordo, kio ne havas apartan sencon por kanakoj.

Oni scias tre malmulte pri la popolado de tiu insularo. Tute certe melanezianoj (la nigraj homoj de okcidenta Pacifiko, el la greka *melas*, nigra kaj *nesos*, insulo) alvenis en pluraj ondoj, eble jam de tri jarmiloj. Estas nun entute dudek-ok kanakaj lingvoj, ĉiuj de la melanezia familio krom unu en *Ouvéa*, la *fagauvea*, kiu estas polinezia. La loĝantoj de la Lojalecaj insuloj havas kutimojn iom pli proksimajn al tiuj de Polinezio kaj estas ofte pli helaj ol aliaj melanezianoj; ŝajnas, ke ili havas interalie samoajn praulojn. Tamen same la melaneziaj kiel la polineziaj lingvoj apartenas al la granda aŭstronezia grupo, kaj ekzistas multaj similecoj en la vivmaniero de ĉiuj popoloj de Pacifiko.

La plej uzataj el la kanakaj lingvoj estas *drehu* (pli ol 15 000 parolantoj, Lojalecaj insuloj), *nengone* (pli ol 8 000, Lojalecaj insuloj), *paicî* (pli ol 7 000, provinco Nordo), *xârâcùù* (pli ol 5 000, provinco Sudo) kaj *ajië* (pli ol 5 000, provinco Nordo). Iuj lingvoj havas nur kelkdek parolantojn kaj troviĝas rande de malapero, kiel *sîchë* (malpli ol 20 parolantoj en la provinco Sudo, sed tre proksima al *ajië*) kaj *pwapwâ* (malpli ol 40 parolantoj, provinco Nordo). Kompreneble ekzistas “dialektoj”, kaj ne ĉiuj fakuloj konsentas pri tiu klasifiko, akceptante ĝis 37 lingvojn. La manko de vehikla melanezia lingvo en Nov-Kaledonio estas grava faktoro por la superregado de la franca, dum male en Franca Polinezio la tahitia ludas ŝlosilan rolon. Nuntempe ĉiuj kanakoj ja bone konas la francan, ofte pli profunde ol sian etnan lingvon, kiun ili preskaŭ neniam povis studi en lernejo. Ekzistas ankaŭ kreolo en Nov-Kaledonio, nomata *Tayo*, kreĝinta surbaze de la franca, sed ĝi estas parolata nur de 2 000 homoj en *Saint-Louis* (municipo *Mont Dore*) tute proksime al Numeo.

Plej multaj kanakoj plu vivas en klanoj, kiuj grupiĝas en triboj kun difinita teritorio. Kvankam multaj tradicioj devenas de antikvaj religioj tipaj de Pacifiko – kaj eĉ de la aŭstronezia mondo – kanakoj kristaniĝis, prefere je la protestanta flanko, pro la tre efika agado de misiistoj en la deknaŭa jarcento. Laŭ ciferoj de 2014 – oni rajtas fari etnajn censojn en Nov-Kaledonio, male al la cetero de Francio – 105 000 loĝantoj de la insularo deklaris sin kanakoj, kio reprezentas 39 % de la tuta loĝantaro. Tiu proporcio iomete malpliĝis kompare kun la lasta popolnombrado (iom pli ol 40 % en 2009). Kanakaj patrinoj naskas meznombro pli da infanoj ol la aliaj grupoj sed, unue, kanakoj vivas averaĝe malpli longe, due, la enmigrado al la insularo restas sufiĉe forta. Oni do komprenas, ke multaj kanakoj estas junuloj, kio signifas pli viglajn kaj “batalemajn” homojn, sed ankaŭ homojn ofte pli atentajn al la “sirenaj voko” de la okcidento.

Plej grave, la proporcio de kanakoj ege varias laŭ la regiono de la insularo:

Melaneziaj landoj

Fiĝioj

Insularo en okcidenta Pacifiko.

Areo: 18 000 km².

Loĝantaro: 900 000.

57 % melanezianoj, 37 % hindoĵ, 6 % alidevenaj.

Oficialaj lingvoj: fiĝia (aŭstronezia), angla, hinda (loka varianto).

Malneta enlanda produkto por individuo: 8 000 \$.

Sendependa de Britio de 1970.

Parlamenta respubliko, membro de *Commonwealth of Nations*.

Malfacila politika vivo pro komunumaj krizoj inter la du ĉefaj grupoj.

Nov-Kaledonio (Kanakio)

Insularo en okcidenta Pacifiko.

Areo: 18 500 km².

Loĝantaro: 270 000.

Interalie 39 % kanakaj melanezianoj, 27 % eŭropanoj.

Oficiala lingvo: franca.

28 aŭstroneziaj lingvoj kaj unu kreolo.

Malneta enlanda produkto por individuo: 37 000 \$

Transmara teritorio de Francio kun aparta statuto.

Papuo-Nov-Gvineo

Orienta parto de la insulo Nov-Gvineo kaj apudaj insularoj.

Areo: 463 000 km².

Loĝantaro: 8 000 000 (78 % papuoj).

Oficialaj lingvoj: angla, *tok pisin*, *hiri motu*, signa lingvo.

Pli ol 800 lingvoj estas uzataj, de la grupoj papua kaj aŭstronezia.

Malneta enlanda produkto por individuo: 2 500 \$.

Sendependa de Aŭstralio de 1975.

Konstitucia monarkio (kun brita reĝino), membro de *Commonwealth of Nations*.

Noto: ni ne traktos tie ĉi la indonezian parton de Nov-Gvineo.

Salomonoj

Insularo en okcidenta Pacifiko.

Areo: 28 400 km².

Loĝantaro: 600 000 (plejparte melanezianoj).

Oficiala lingvo: angla. Nacia lingvo: *pisin*

Ekzistas ĉirkaŭ 75 lingvoj en tiu insularo (aŭstroneziaj kaj 4 papuaj).

Malneta enlanda produkto por individuo: 2 000 \$.

Sendependa de Britio ekde 1978.

Konstitucia monarkio (kun brita reĝino), membro de *Commonwealth of Nations*.

Vanuatuo

Insularo en okcidenta Pacifiko.

Areo: 12 000 km².

Loĝantaro: 270 000 (preskaŭ ĉiuj melanezianoj).

Oficialaj lingvoj: bislama (piĝino proksima al *pisin*), franca, angla.

Ekzistas centoj da lingvoj aŭstroneziaj en tiu insularo (la plej alta lingvo-denseco en la mondo!).

Malneta enlanda produkto por individuo: 2 500 \$.

Sendependa de Britio kaj Francio de 1980.

Parlamenta respubliko, membro de *Francophonie* kaj *Commonwealth of Nations*.

Oftaj problemoj pro ciklonoj kaj vulkanaj erupcioj.



El Vikimedio. 14.08.2005. Aŭtoro: Bruno.Menetrier.

Tradicia kanaka domo en Lifou.

ili estas ĉirkaŭ 74 % en la provinco Nordo, 97 % en la Lojalecaj insuloj, sed multe malpli – nur 26 % – en la Sudo. Tiu ĉi provinco, en kiu troviĝas la insulara ĉefurbo Numeo (*Nouméa*), estas multe pli loĝata ol la aliaj du, kun entute 200 000 homoj; en ĝi la kanaka identeco tendencas dissolviĝi. Tiom pli, ke junaj kanakoj ĵus alvenintaj en la ĉefurban areon ofte emas lozigi siajn ligojn kun la klano. Malfacile trovante novan identecon en la okcidenta mondo kaj ne sukcesante integriĝi en socio, kie plu regas fortaj etnaj diskriminacioj, ili ofte fariĝas marĝenuloj, foje sen fiksa restadejo – aŭ loĝas en laddomoj –, tial multiĝas alkohol- kaj perfort-problemoj.

Naturaj kaj ekonomiaj riĉaĵoj

En la plej diversaj pejzaĝoj, arbaraj aŭ savanaj, sur la rifo kaj en la oceano vivas tre multaj estuloj, kun rimarkinda proporcio de endemiuloj – verŝajne la plej



El Vikimedio, majo 2009. Aŭtoro: Mike Bayly.

Floro de *Amborella trichopoda*.

alta en la tuta mondo. Miloj kaj miloj da specioj estas konataj nur en Nov-Kaledonio. Sola en sia genro, familio kaj ordo, amborelo (*Amborella trichopoda*) estas la plej primitiva florplanto, sed entute kvin familioj de plantoj, kun pluraj genroj kaj pli ol tri mil specioj, estas endemiaj de la teritorio. Same por miloj da moluskaj, insektaj kaj krustacaj specioj. Kaj kompreneble la inventaro restas for de kompleteco. Ankaŭ multaj vertebruloj estas tipaj de la insularo: fiŝoj, rampuloj, birdoj... El tiuj ĉi lastaj ni citu la faman kaguon (*Rhynochetos jubatus*), kiu preskaŭ ne povas flugi, havas tre apartajn trajtojn kaj pro tio restas izolita en la birda klasifiko. Tre minacata, ĝi tamen ofte vidiĝas... sur la blazonoj kaj emblemoj de la teritorio. Cele al



El Vikimedio, 2004. Aŭtoro: Scott Meyer.

Kaguo (*Rhynochetos jubatus*).

protektado de tiu unikega biodiverseco, kreiĝis en 2014 la natura parko de la Korala maro (1,3 milionoj da km²), laŭ surfaco la unua plej granda de Francio kaj la dua en la tuta mondo. Ĝi entenas terajn kaj marajn areojn, kun diversaj gradoj de protekto laŭ la loko. Ekzistas ankaŭ pluraj provincaj rezervejoj, kiel *Parc des Grandes Fougères* (Parko de la Grandaj Filikoj), en *Farino*, provinco Sudo, kie kun iom da ŝanco oni povas vidi la faman kaguon.

Aliaj naturaj riĉaĵoj, kun forta ekonomia valoro, estas la mineraloj, ĉefe ercoj. Antaŭ proksimume 35 milionoj da jaroj, dum la eocena periodo, parto de la mantelo venis al la tera surfaco, entenante ultrabazajn rokojn, riĉajn je metaloj interalie el la fera grupo. Triono de la surfaco de Granda Tero konsistas el tiaj rokoj, en kiuj troviĝas fero, nikelo, kobalto, kromo,



El Vikimedia, 2008. Aŭtoro: Barsamuphe.

Baza kampo de la nikel-minejo Goro.

mangano, magnezio. Nikelo estas la plej konata metalo de Nov-Kaledonio, kie probable troviĝas triono de ĝiaj tutplanedaj rezervoj. La nuna produktado reprezentas ĉirkaŭ 10 % de la tutmonda, kun variaj profitoj, laŭ la fluktuadoj de la merkato. Entute la perspektivoj estas tre bonaj, ĉefe pro bezono de metaloj en elektronikaĵoj. Tamen la minejoj estas plejmulte subĉielaj kaj, ankaŭ pro la uzinoj, kiuj traktas surloke grandan parton de la ercoj, poluado en multaj lokoj fariĝas neeltenebla – malgraŭ bombastaj asertoj, ke ĵusaj progresoj ebligis draste malpliigi la toksaĵojn.

Pacifika franko (*Franc pacifique*)

En ĉiuj tri teritorioj de Oceanio, kiuj dependas de Francio, oni uzas Pacifikan frankon. Tiu valuto estis kreita en 1945, post la *Bretton Wood* interkonsentoj, samtempe kiel la franko CFA, plu uzata en pluraj afrikaj landoj, nun sendependaj.

Komence ligita al franca franko, Pacifika franko kompreneble nun dependas de eŭro:

1 000 XPF = 8,38 €.

Dum multaj deziras rekte uzi eŭrojn, sendependistoj preferus specifan valuton. Tamen post la referendumo de 2018 en Nov-Kaledonio verŝajnas, ke la tri koncernataj teritorioj petos rektan uzon de eŭro. Tio konfirmus monan stabilecon kaj faciligus interŝanĝojn.

Kolonia historio konfliktoplena


Plejofto dum la batalo por akiri forajn teritoriojn Francio malgajnis kontraŭ Britio, tamen en Pacifiko ĝi ne malbone elturniĝis, eĉ se en tiu giganta oceano multaj teritorioj estas (eks)britaj kolonioj.

Nia celo kompreneble ne estas priskribi detale la pasintecon de Nov-Kaledonio. Tamen historio multon klarigas tiom pli, ke daŭre aperas la sama, kutima

konflikto inter koloniantoj kaj indiĝenoj. Sed tia konflikto disvolviĝas malsame laŭ la lokoj, kaj de ties specifaj trajtoj dependas la estonteco de ĉiu aparta lando.


Ekde la alveno de la fama *James Cook* (1774), kiu donis eŭropan nomon al tiu insularo, pluraj navigistoj, ĉefe francaj, vizitis la teritorion, tuj sekvataj de kristanaj misiistoj. Unue la protestantaj estis pli entreprenemaj, sed poste ankaŭ la katolikaj tre aktivis. Ne ĉiam sukcese: en 1847 kanakoj atakis misiejon kaj mortigis plurajn religiulojn. Tiuj ĉi estis tamen plej bonintencaj: krom savi kanakajn animojn, ili provis malaperigi kanibalismon (tradicie praktikatan tie kiel en multaj aliaj Pacifikaj insularoj) kaj plibonigi la vivkondiĉojn de virinoj, kiuj faris la plej pezajn taskojn. Tuj post tiu malsukceso, katolikaj misiistoj revenis, eĉ en plurajn lokojn kaj kun malpli da malfacilaĵoj.

La franca imperiestro Napoleono la Tria bezonis novan, “virgan” teritorion por establi grandskalan, sekuran punlaborejon. La 24an de septembro 1853 Nov-Kaledonio estis aneksita de Francio kiel kolonio, kompreneble eĉ sen uzi farsan “plebisciton”, kiel oni ja faris en Nico kaj Savojo kelkajn jarojn poste. Ekde 1864 miloj da homoj alvenis kiel punlaboristoj. En 1870, sekve de malvenko kaj eĉ kaptiteco en grava batalo de Francio kontraŭ Prusio, Napoleono la Tria devis ekŝiĝi, kaj Francio triafoje fariĝis respubliko. Sed dum la printempaj monatoj de 1871 okazis la “komunuma ribelo” en Parizo, kiun la “burĝa” povo sukcesis ven-



El Vikimedia.

Nov-kaledoniaj indiĝenoj, ĉirkaŭ 1880.



El Vikimedio. Fonto: Clement Lindley Wragge (1906) *The Romance of the South Seas, Chatto & Windus.*

Granda ĉefo.

ki. En 1880 amnestio eblegis revenon de la kondamnitaj al Francio, sed kelkaj restis. Restis ankaŭ homoj el Nord-Afriko, kondamnitaj pro ribelo kontraŭ Francio, kiu same koloniis ilian teritorion. Do, samkiel en aliaj oceaniaj teritorioj, ekspunlaboristoj definitive loĝis en sia puninsulo, sed la okcidentdevena loĝantaro ne tiom rapide kreskis. Fakte la punlaborejo ne plu ricevis novajn homojn ekde 1898, tamen ĝi funkciis ĝis 1924. Sed entute tiu teritorio estis konsiderata kiel tro fora kaj ne sekura. Ĉar kanakoj ne facile akceptis tiun entrudiĝon de koloniantaj fremduloj el alia flanko de la planedo. Kompreneble la francoj provis marĉandi pri teroj kun kanakaj ĉefoj, eĉ akriigi konfliktojn inter triboj, sed ne malofte kanakoj ribelis kaj mortigis novalvenintojn. En 1878, sub la gvido de *Ataï*, ĉefo de *Komalé*, pluraj triboj alianciĝis kaj sukcese atakis diversajn setlejojn, eĉ minacante la bone defenditan Numeon. Okazis masakroj ambaŭflanke, finfine *Ataï* mem estis perfidita kaj mortigita. Entute tre multaj homoj mortis dum tiu ribelo (fakte milito), verŝajne 200 okcidentanoj kaj almenaŭ 1000 kanakoj.

Tiu milito, post kiu tre multaj kanakoj estis kondamnitaj kaj devis forlasi sian teron, malbonigis la situacion de la melanezianoj. Kiel indianoj en Nordameriko, ili perdis terojn kaj devis fakte vivi en difinitaj tribaj areoj, veraj rezervejoj. Ekde 1887 la “kodo de indiĝeneco” plene aplikiĝis: tio signifis perfortajn laborojn, senfinajn malpermesojn – migri nokte, labori kie oni volas, voĉdoni... – kaj pezegajn “laŭkapajn” impostojn. Aldone importitaj malsanoj kaj alkoholismo faris ege multajn viktimojn. Inter 1900 kaj 1920 kanakoj nombris maksimume 28 000 entute, dum ili estis tutcerte pli ol 42 000 en 1887 kaj ĉirkaŭ 70 000 en 1853. Diris iu ĉefo: «La blankuloj mensogis al ni, pli bone ni drinku kaj mortaĉu».

Alia grava ribelo okazis en 1917. Jam por tuta Francio tiu jaro estis aparte malfacila. La unua mondmilito ŝajnis senfina, sur la fronto iuj soldatoj rifuzis plu militi kaj oni “porekzemple” mortpafis nemalmultajn, foje iujn tute ne kulpajn pri dizerto. Kvankam, kiel indiĝenoj, kanakaj viroj ne estis rekte mobilizeblaj, ili rajtis “volontule” soldatiĝi, kaj oni imagas, ke entute ili ne vere rajtis elekti. Pli ol mil viroj devis partopreni kaj multaj ne revenis. Sed al tio aldoniĝis pliaj malkontentigaj faktoroj. Unu el ili estis ke bredado de brutaro postulis terenon, kaj koloniantoj okupis kampojn, kie indiĝenoj kultivis interalie ignamon. La franca administracio pli kaj pli premis la ĉefojn, oni volis malaperigi fizikajn elementojn de lokaj kulturoj, ŝanĝi vestkutimojn, konstrui novajn domojn ortangulajn tute ne taŭgajn. Kaj finfine naskiĝis ĉe kanakoj nacia sento, reage al la humiligoj, kiujn ili devis elteni de jardekoj.

Tiu nova ribelo estas aparte kompleksa, kun komence konfliktoj inter klanoj ribelaj kaj aliaj, kiuj akceptis la francan regadon. Interpaciga ceremonio degeneris, klanoj intermilitis, kaj farmdomoj, loĝejoj de koloniantoj estis detruitaj ĉefe en *Konè*, *Tipindjé* kaj *Hienghène* (centro de Granda Tero, nuna provinco Nordo). Entute la ne-kanakaj viktimoj estis 12, sed eble 300 melanezianoj mortis, ĉu pro reago de la franca armeo ĉu pro klanaj interbataloj. Kvankam estis kondamnoj, eĉ kvin je mortopuno, amnestio okazis jam en 1920. La fifama laŭkapa imposto pagenda de la indiĝenoj altiĝis, sed oni atentis pri tribaj teritorioj, evitante brutpaŝtadon meze de kultivejoj. La kanakaj soldatoj revenintaj el la milito rajtis je avantaĝoj, interalie nepago de imposto kaj eblo libere establiĝi, kie ili deziras.



El Vikimedio. Fonto: Clement Lindley Wragge (1906) *The Romance of the South Seas, Chatto & Windus.*

Tri “timigaj” kanakoj.

Dum la postaj jaroj civila registrado de kanakoj (kiel por plenrajtaj civitanoj) ekfunkciis, entute la vivkondiĉoj de la indiĝenoj pliboniĝis – rekreskis la kanaka loĝantaro –, sed la konsidero pri tiu popolo en Francio ne tiom altiĝis, ekzemple dum Internacia Kolonia Ekspozicio (1931) oni prezentis “kanakan bestĝardenon” - tio signifas, ke la “bestoj” estis kanakoj – kaj tiu cirko poste turneis tra Eŭropo.

Tamen fine de la dua mondmilito, la kodo pri indiĝeneco estis abolita en Nov-Kaledonio same kiel en multaj aliaj francaj teritorioj, do teorie kanakoj iĝis “normalaj” francaj civitanoj.

Sur politika kampo

Inter 1945 kaj la komenco de la 1960aj jaroj multegaj teritorioj fariĝis sendependaj ŝtatoj. Foje tio okazis post akra konflikto, eĉ post pli aŭ malpli longa milito kontraŭ la kolonia potenco. Foje estis sufiĉe facile. Sed ne tiom por insul(ar)oj, ĉefe etaj. En Pacifiko tiu evoluo okazis malfrue, kaj pluraj teritorioj restas sub fremda regado.

Kvankam ekde 1946 ĉiuj melanezianoj devintus libere voĉdoni, longis la procezo: oni komencis per la ĉefoj, poste aliaj “gravuloj”, kaj nur en 1957 ĉiu fariĝis vera, plenrajta civitano. La unuaj movadoj, kiuj okupiĝis politike pri defendo de kanakoj, estis kaj komunistoj, kaj asocioj kreitaj de religiuloj, protestantaj kaj katolikaj. La situacio estis malfacila, la statuto de transmara teritorio donita en 1957, kun iom da aŭtonomio, estis preskaŭ nuligita en 1963 sub la tre jakobena regado de la prezidento *Charles de*



Fonto: <https://www.gitpa.org/Peuple>.

La kanaka deputito Rock Pidjot.

Gaulle. La kanaka deputito *Rock Pidjot* (1907-1990, daŭre elektita inter 1964 kaj 1986), komence modera aŭtonomisto tre influata de katolikismo, provis lukti kontraŭ tiu centraliza sinteno. Oni devas mencii la fakton, ke la forta kristana influo al la kanakoj venas precipe de la tre homa sinteno de plej multaj misiistoj, kiuj scipovis ne nur okupiĝi pri la kanakoj en iliaj ĉiutagaj bezonoj sed ankaŭ protektis ilin kontraŭ la koloniantoj, eĉ evitigante masakrojn. Sed ankaŭ kristanisma influo havas siajn limojn kaj, inspirite de la “liberiga” filozofio de 1968, kulturaj grupoj aperis,



El Vikipedio. Aŭtoro: WarX, 01.01.2006.

Standardo de Nacia Fronto Kanaka kaj Socialisma por Liberiĝo (FLNKS).

kiuj remalkovris kaj realproprigis al si la melanezian kulturon. Jam fine de la 60aj jaroj, du maldekstregaj grupoj postulis sendependigon. Post la granda sukceso de la festivalo *Melanesia 2000* en 1975, la partio *Union Calédonienne* (Kaledonia Unuiĝo, estrata de *Rock Pidjot*), jam fondita en 1953, fariĝis sendependisma en 1977 kaj aliĝis al *Front Indépendantiste* (Sendependisma Fronto), kiu aktivis inter 1979 kaj 1984. En tiu ĉi lasta jaro tiu strukturo iĝis *Front de Libération Nationale Kanak et Socialiste* FLNKS (Nacia Fronto Kanaka kaj Socialisma por Liberiĝo), politika federacio, kiu ludis ĉefan rolon en la “eventoj”, kiuj akompanis kaj sekvis ĝian kreadon.

Kvarjara tumulto (1984-1988)

Depost la venko de la socialistoj en 1981 kun la elekto de *François Mitterrand* kiel prezidento kaj la pretigo de leĝoj donontaj pli da graveco al lokaj instancoj, FLNKS esperis progresojn en la kanakia aŭtonomio, eĉ aliron de la teritorio survoje al sendependado. *Rock Pidjot* mem alproksimiĝis al la socialistoj kaj per ties subteno estis reelektita en 1981. Estis grandaj politikaj manovroj kaj ankaŭ murdo de ĝendarmoj. Tamen ekis diskutoj inter la franca registaro, *Rassemblement Pour la Calédonie dans la République*, RPCR (Kuniĝo por Kaledonio ene de la Respubliko, tiam reganta politika partio, dekstra kaj kontraŭsendependisma), kaj FI/FLNKS. Sed la etoso estis aparte streĉa, kaj konkretaj rezultoj ne aperis. Finfine FLNKS decidis bojkoti la balotojn. Iu kanaka partio ja partoprenis, sed la rezulto estis ege favora al la “koloniantoj” de RPCR, kun 34 seĝoj el 42 (kaj nur

6 por sendependistoj). Tamen FLNKS kontrolis parton de la teritorio pere de sia regado de multaj municipoj kaj kutimaj (tribaj) asembleoj. La unuan de decembro aperis la flago de *Kanaky* kaj “provizora registaro” sub la prezido de *Jean-Marie Tjibaou* (1936-1989), katolika pastro kontraŭperfortema kaj karismoplena, kiu petis forlasi sian eklezian statuson por povi plene sin dediĉi al politiko kaj liberigo de sia popolo. Reago al tiu registara proklamo tuj alvenis: la 5an de decembro, apud *Hienghène* (Nordo) dek homoj el la tribo de *Tjibaou*, interalie du el liaj fratoj, revenante veturile al sia loĝloko tra la arbaro, estis



Jean-Marie Tjibaou.

mortigitaj de embuskantaj bredistoj, kiuj ŝajne esperis, ke ankaŭ *Jean-Marie* troviĝas en la grupo. Kelkajn semajnojn poste la kanaka gvidanto *Eloi Machoro* (1945-1985) estis mortigita de ĝendarmoj en neklaraj cirkonstancoj, kadre de ribeloj kaj okupo de farmdomo.

Oni do alvenis al iaspeca milito inter kanakoj kaj “kaldoŝoj” (france *Caldoches*, eŭropdevenaj loĝantoj de Nov-Kaledonio, idoj de familioj de longe vivantaj en la insularo). Kompreneble la situacio estis kaj plu estas komplika: iuj melanezianoj favoris la francan suverenecon, dum kelkaj eŭropanidoj subtenis kanakojn. Kaj estis – plu estas – diversetnaj novalvenintoj, kun diversaj sintenoj sed majoritate favoraj al franca regado, pri kiuj ni parolos poste.

Por kvietigi la situacion la franca registaro (pere de iaspeca “alta prefekto”) proponis la 7an de januaro 1985 tutsimple projekton pri “sendependendo-asocio” kun baldaŭa referendumo. Sed la teritoria asembleo,

estrata de kaldoŝoj, rifuzis. La konflikto akriĝis, la areoj kontrolataj de kanakoj ofte ne plu estis alireblaj por la “respublikaj” armeanoj kaj policianoj. Lernejoj kreĝis, kiuj uzis kanakajn lingvojn. La 12an de januaro nokta elirmalpermeso estis deklarita, ĝi daŭris ses monatojn. Prezidento *François Mitterrand* mem fulmrapide vizitis la teritorion, anoncante novan statuton. Estos kvar regionoj en la insularo (tri en Granda Tero), kiuj sendos reprezentantojn al la kongreso (teritoria asembleo). FLNKS akceptis kaj partoprenis en la balotoj: ĝi venkis en tri regionoj, sed “lojalistoj” konkeris – pli ĝuste konservis – la Sudon kaj eĉ la kongreson, pro la alta loĝateco de la Numea distrikto.

En 1986 dekstruloj reprenis la povon en Parizo, kaj decidis luktati kontraŭ sendependismo en Nov-Kaledonio tiom pli, ke la polineziano *Gaston Flosse* (pri kiu ni abunde parolis en *Etnismo* no 85) (1) ricevis la taskon okupiĝi pri la problemo. La registaro promesis novan statuton kaj eĉ referendumon, en kiu partoprenos nur homoj, kiuj vivas almenaŭ de tri jaroj en la teritorio. Tamen oni facile povas diveni la rezulton. La ĉefministro *Jacques Chirac* venis mem anonci gravajn subvenciojn en aŭgusto 1986 sed, kelkajn semajnojn antaŭe, pro la vigla agado de *Jean-Marie Tjibaou* kaj la subteno de Forumo de Pacifikaj insuloj, UN enmetis Nov-Kaledonion en la liston de ne-aŭtonomaj – alivorte malkoloniendaj – teritorioj. Jen grava bato por la franca registaro.

En 1987 okazis “nomada” kontrolo de triboj fare de rapide moviĝantaj militistaj patroloj, kiuj daŭre trairis la teritorion. Melaneziaj manifestacioj estis malpermesitaj, sed tiuj de kaldoŝoj disvolviĝis senprobleme. Septembre okazis la promesita referendumo pri la estonteco de Nov-Kaledonio, bojkotita de FLNKS.

98,3 % de la voĉdonantoj rifuzis sendependon; la partopreno atingis 59,1 %.

Tuj post tiu nova voĉdonado revenis la ĉefministro *Chirac*, kiu anoncis interalie novan statuton (!) kaj pli da potenco por la tribaj asembleoj. Okazos balotoj la 24an de aprilo 1988, tio estas la sama tago, dum kiu oni ekelektos prezidenton en tuta Francio. Ni notu, ke inter 1986 kaj 1988 la (dekstra) ĉefministro *Chirac* havis multe pli da povo ol la (maldekstra) prezidento *Mitterrand*, minoritatigita pro perdo de plimulto en la parlamento.

Fine de 1987 tribunalo definitive senkulpigis la kaldoŝajn murdintojn de *Hienghène*, kun la preteksto, ke ili troviĝis en situacio de plenrajta sindefendo... La interetna etoso ankoraŭ pli malboniĝis dum la unuaj monatoj de 1988, kun rektaj bataloj inter kanakoj kaj ĝendarmoj. Kaj du tagojn antaŭ la voĉdonado, tio estas la 22a de aprilo, sur la insulo *Ouvéa* ĝendarmejo estis atakita, kvar ĝendarmoj estis mortigitaj kaj dudek sep kaptitaj. Iujn oni liberigis, sed aliaj trovis sin enkarcerigitaj en groto. Post komplikaj kaj malfacilaj

diskutoj, eĉ hominterŝanĝoj, la 5an de majo la loko estis atakita de armea taĉmento, dek naŭ kanakoj kaj du francaj soldatoj estis mortigitaj. Tiu evento ŝokis la tutan francian publikon tiom pli efike, ke tre proksimis la dua vico de prezidentaj balotoj. Eblas ja, ke ankaŭ tio favoris la reelekton de *Mitterrand*. Tiu ĉi tuj dissolvis la parlamenton (deputitan ĉambron); post nova balotado li rehavis plimulton – kvankam malfortan – kaj nomumis *Michel Rocard* kiel ĉefministron.

Finfine interkonsentoj

Homo inteligenta kaj klarvida, *Rocard* tuj komprenis, ke la socialista hezitemo kaj la dekstrula rigideco kondukos nur al pliakrigo de situacio jam sufiĉe danĝera por la insularo kaj entute ne aparte flata por Francio. Li decidis senprokraste trakti la dosieron. Jam la 26an de junio 1988 la interkonsento de *Matignon* (nomo de la ĉefministrejo en Parizo) estis subskribita de du delegacioj, tiu de FLNKS estrata de *Jean-Marie Tjibaou* kaj tiu de la “lojalistoj” (ĉefe RPCR) gvidata de la kaldoŝa deputito *Jacques Lafleur* (1932-2010). Ankaŭ tiu homo montriĝis aperta kaj dialogema. Aldoniĝis la interkonsento de *Oudinot* (nomo de la Pariza strato, kie troviĝas la ministrejo pri transmaraj aferoj), subskribita de la samaj la 20an de



Interkonsento de Matignon sub la direkto de la franca ĉefministro Michel Rocard. Vidalvide sidas Jean-Marie Tjibaou kaj Jacques Lafleur.

aŭgusto. Kaj, la 6an de novembro de la sama jaro, la tutfrancia elektantaro aprobis la interkonsentojn, premisojn al memdeterminado, per 80 % de la voĉoj – sed nur 37 % de la elektantaro partoprenis.

Dialogemaj membroj de FLNKS plej koste pagis sian apertan sintenon: la 4-an de majo 1989, dum ceremonio en *Ouvéa*, *Jean-Marie Tjibaou* kaj lia “dekstra brako” *Yeiwéné Yeiwéné* (1945-1989) estis mortigitaj de membro de kanaka partio, kiu rifuzis la interkonsentojn.

Sed kio ja estas en tiuj interkonsentoj?

La nova statuto antaŭvidas tri provincojn (pri kiuj ni jam parolis), kun sufiĉe vastaj kompetentoj: infrastrukturoj, ekonomia disvolvado, profesia trejnado – kun insisto pri melanezianoj –, prisana kaj socia agado, loka kulturo, instruado de la kanakaj lingvoj, organizo de sporto kaj libertempo...

Ĉiu provinco havas elektitan asembleon; apude estas triba konsilantaro (kun la ĉefoj kiel membroj), konsultenda interalie pri juraj demandoj koncernaj melanezianojn kaj ties teritoriojn; tiu konsilantaro povas mem sin turni al la provinca asembleo kaze de aparta problemo, kiu tiam devas esti traktata.

La teritorio estas estrata de kongreso, konsistigata de la tri provincaj asembleoj. Ĝi okupiĝas pri budĝeto, impostoj, gravaj infrastrukturoj, kaj rajtas adapti la naciajn programojn por unuagrada edukado.

Aldone la ŝtato investos prioritare en la provincoj Nordo kaj Insuloj, ĝis tiam plej forlasitaj kaj loĝataj precipe de kanakoj.

Memdetermina voĉdonado estis antaŭvidita por 1998.



Ek al manpremo inter Jacques Lafleur, “lojalisto” kaj Jean-Marie Tjibaou, “sendependisto”.



El Vikimedia, 04.04.2006.

Grupo de kanakaj virinoj.

La Numea interkonsento: pozitivaj konsekvencoj por kanakoj

La 5an de majo 1998 estis subskribita la Numea interkonsento, kiu antaŭvidis transdonon de pli kaj pli da kompetentoj al la teritorio kaj ankaŭ voĉdonadon pri sendependado inter 2014 kaj 2018. En la antaŭparolo de tiu teksto la kanaka identeco estas agnoskita, sed ankaŭ la legitimeco de la ne-indiĝenaj loĝantoj.

Tiu interkonsento inter la franca registaro kaj plejmulto de la novkaledoniaj partioj estis aprobita (ĉi-foje nur en la teritorio) per 72 % de la voĉdonoj kaj kontraŭita de 28 % (naciaj francaj partioj kaj ankaŭ kanaka, kiu volis tujan sendependiĝon). Preskaŭ 75% de la elektantaro voĉdonis.

Tuj post tiu aprobo, en 1999, estis kreita triba senato (*sénat coutumier*), surbaze de la tribaj konsilantaroj, kun entute 16 membroj, po du por la ok tribaj areoj. La triboj mem decidas pri la formo de la elektoj. Tiu senato rajtas okupiĝi pri ĉiuj demandoj rilataj al la indiĝenoj, ties identeco, kulturo kaj ankaŭ tribaj bienoj, regataj de aparta jura kodo. La senato estas konsultata de la kongreso kaj povas al tiu submeti demandojn; ankaŭ la “alta komisaro” (iaspeca prefekto, kiu reprezentas la respublikon en la teritorio) devas ĝin konsulti.

Ekde la komenco de la jaroj 2000, oni instruas kanakajn lingvojn en lernejoj, eĉ 19 el la 28 agnoskitaj, kaj sufiĉe intensive, sed nur 16 % de la lernantoj en la unuagrada lernejoj havas aliron al ili, kaj tute certe multe malpli en la duagrada. Studentoj povas diplomigi en la universitato de Nov-Kaledonio elektante du kanakajn lingvojn, unu el Granda Tero kaj alian el la Lojalecaj insuloj; kanaka lingvo estas elektebla kiel opcio por abiturientiĝo (same kiel “regiona” lingvo en multaj lokoj de metropola Francio). En 2007 kreiĝis akademio de la kanakaj lingvoj. Ĝi okupiĝas pri normaligo kaj antaŭenigo de

tiuj lingvoj. Ĝi ankaŭ (kun)organizas seminariojn kaj kolokvojn, ekzemple lastoktobre pri la temo “regionaj kulturoj kaj lerneja sukceso” por montri, ke plurlingvismo pli bone kondukas al sukceso ol unulingvismo franca. Ĉar, kiel preskaŭ ĉie en la mondo, oni kredigas al gepatroj, ke nur submetiĝo al reganta kulturo garantias perfektan ensociiĝon. Pro tio granda plimulto de la nunaj kanakaj infanoj estas nur franclingvaj.

Kadre de pripensado ĉirkaŭ renovigado de triba (kutima) juro, dum la 2010aj jaroj oni diskutis pri “soklo de kanakaj valoroj” kaj ĉarto de la kanaka popolo, kiuj ambaŭ aperis en 2014, kun multaj punktoj ilustrantaj la kanakajn tradiciojn kaj vivmanieron.

Alia grava sektoro, kiu nun rekte koncernas la indiĝenojn, estas la minejoj: tribaj aŭtoritatoj rajtas partopreni en la ekspluatado aŭ decidi pri ties kondiĉoj sur sia teritorio, foje rekte kunlaborante kun eksterlandaj firmaoj, eĉ se la posedanto plu restas la franca ŝtato.

Ne ĉiuj aprezis tiujn progresojn en la enplektiĝo de la indiĝenoj mem, kiuj pli kaj pli mastrumas sian antikvan teritorion; ili opinias kanakojn tro “dorlotitaj” de la franca registaro, kiu eĉ ŝajnas preti rezigni pri teritorion; kiu eĉ ŝajnas preti rezigni pri ĉiaspeca suvereneco super la “Ŝtoneto” (*le Caillou*), kiel nomas ĝin kaldoŝoj kaj multaj novalvenintoj.



Stefano Keller, UEA-representanto, kun Roger Cho, delegito de “Congrès Populaire Coutumier Kanak” (Popola Kongreso Tradicijura Kanaka) ĉe UN en Ĝenevo. Kune ni partoprenis en kunsido de “Ekspertaj Mekanismoj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj” (EMRIP), 2016. (2).

Streĉaj pretigoj

Oni devos atendi la finon de la antaŭvidita periodo, tio estas la lastaj monatoj de 2018, por ke okazu la memdetermina referendumo; la preciza dato ne estas konata. Ankaŭ la demando, kiu troviĝos sur la voĉdoniloj, nun ne klaras. De jaroj komitato okupiĝas pri tiu referendumo, sed la ĉefa demando tutsimple estas: kiu rajtos voĉdoni? FLNKS favoris plej malnovan ĉeeston en la insularo, la “lojalistoj” male volis enpreni novalvenintojn. Ŝajnas, ke homo devos esti rezidanta en la teritorio ekde la jaro 1994 por voĉdoni, sed restas kelkaj diskutendaj problemoj. Kompreneble plej multaj kanakoj deziras sendependon, kaj male preskaŭ ĉiuj kaldoŝoj elektas restadon en Francio, tamen kun granda aŭtonomio. Ekzistas ankaŭ homoj, kiuj volas, ke Nov-Kaledonio iĝu nura franca departemento, kiel Reunio aŭ Martiniko. Granda parto de la respondo al la demando pri estonteco troviĝas en la etna konsisto de la loĝantaro. La lasta popolnombro, farita en 2014, donis la jenajn rezultojn:

- Kanakaj melanezianoj: 39 %
- Eŭropanoj: 27 % – kaldoŝoj kaj novalvenintoj.
- “Kaledonianoj”: 8,5 % – personoj, kiuj decidis sin defini simplaj loĝantoj de la insularo.
- Mestizoj, plurkomunumanoj: 8,5 %
- Valisanoj kaj Futunanoj: 8 % – Valiso kaj Futuno estas franca polinezia insularo.
- Azianoj: 3 %
- Tahitianoj: 2 %
- Vanuatuanoj: 1 %.

La ceteraj (proporcie malmultaj homoj) indikis neniun apartenon.

Oni ja povas diveni kiuj estas la plej kontraŭstarantaj grupoj, sed la rezulto de la referendumo ne klaras el tiaj datenoj. Evidentas nur, ke la aŭtoktonoj konsistigas relativan plimulton kaj bezonas apogon de aliaj por sukcesi konstrui sendependan teritorion.

La konsisto de la nuna kongreso (2014-2019) diras multon per si mem. Sen eniri detalojn – tiom pli malfacilus, ke ne tre stabilas la partioj, ĉefe dekstraj – oni povas diri, ke el 54 elektitoj 29 estas “lojalistoj” kaj 25 favoraj al sendependiĝo. Ĉu tio implicas, ke 54 % de la novkaledonianoj ne deziras forlason de Francio, male al 46 %, kiuj emus al kreo de nova ŝtato en okcidenta Pacifiko? Ĝuste tiujn ciferojn konfirmas la plej ĵusaj opinisondoj. Sed ĉu tiuj ĉi vere estis faritaj en kondiĉoj similaj al tiuj de la voĉdonado? En la porfranca kampo iuj timas, ke ne.

Se la rezulto de la referendumo estos “ne” al sendependon en 2018, oni revoĉdonos en 2020 kaj samkondiĉe ankaŭ en 2022.

La registaro en Parizo aspektas sufiĉe neŭtrala kaj montras fortan volon glatigi la procezon ĝis la punkto, ke ĝi ĵus solvis gravajn rilatproblemojn en la insularo. Oni povas supozi, ke la nuna franca registaro, same kiel la antaŭaj, absolute volas konservi Nov-Kaledonion. Diversaspekte estas riĉa, eĉ ŝlosila teritorio. Ankaŭ mare: en 2015 post tutmonda interkonsento la ekskluzivaj ekonomiaj zonoj plivastiĝis ĝis 200 mejloj de la marbordoj. Tiu de Francio estas nun la dua en la mondo (post tiu de Usono) kaj eble fariĝos la unua, ĉar novaj ebloj estas konsiderataj. Nov-Kaledonio havas dekonon el ĝi. Sed la franca armeo jam devis forĵeti plurajn fiŝkaptajn ŝipojn alilandajn, kaj “lojalistoj” uzas la argumenton, ke tutsole Kanakio ne kapablos defendi sian vastan maran areon.

Tamen io certas: kia ajn estos la rezulto de tiu referendumo, oni povas atendi pli da aŭtonomio por tiu insularo, kaj tio povos konduki al samdirektaj aranĝoj por aliaj teritorioj. Ĉar la reveno de Francio ekde kelkaj jaroj al forta jakobenismo estas vera plago, malbone akceptata de plej multaj lokaj respondeculoj, kiuj ĝis nun povis nenion fari. Ni do esperu, ke la kanakoj kaj iliaj amikoj elpafos ĉiujn siajn sagojn kontraŭ tiu arkaika sistemo; tio helpos ne nur al ili sed ankaŭ al ĉiuj minoratigitaj, tro ofte malestimataj popoloj kaj kulturoj de Francio. **AF**

Notoj:

(1) *Etnismo* n-ro 85 legeblas je:

http://www.etnismo.org/arkivo/Etnismo_85.pdf

(2) Je la suba adreso oni povas spekti filmon franclingvan realigitan de *Stéphane Pécorini* kaj *Fabienne Gautier*, kunlabore kun *Roger Cho*: “*Rien ne se fait dans le ciel*” (Nenio fariĝas en la ĉielo). *Stefano Keller* nun laboras al la esperantigo de la subtitoloj de tiu ĉi filmo.

<https://www.kanaky.ch/> aŭ nur la komenco je Jutubo: <https://www.youtube.com/watch?v=N3gnVQgVVSk> (jutuba adreso mallongigite: <https://goo.gl/RgcyYL>)



El Vikimedia. Aŭtoro: Roman.b. Vido al la golfo Prony.

Verki per sia vilaĝa dialekto

Cu tiu ĉi temo estas vere etnista? Mi volas diri en la senco plej ofte esprimata en tiuj ĉi paĝoj, t. e. lukto de popoloj por esti rekonataj?

Ne temas pri tio en tiu ĉi artikolo. Temas pri verkisto forte ligita al la vilaĝo de sia infaneco, kiu decidas verki en sia dialekto. Kaj tio, laŭ mi, koncernas ankaŭ etnismon ĉar inter la kriterioj por difini etnon estas teritorio, lingvo kaj kulturo. Literaturo do gravas por etnoj, kaj ni ofte ilustras artikolojn pere de poemoj. En tiu ĉi kazo la ĉefa temo estas verkisto en rilato kun sia etno. Komence ni iom interesiĝos pli vaste pri Lukanio, kiu ne reprezentas etnan tuton sed male estas ege pluretna, same kiel la aliaj suditalaj regionoj. Lukanio postulas nek pli da aŭtonomio, nek sendependiĝon. Sed, kiel skribas *Carlo Minnaja* en la enkonduko de sia antologio, same kiel tuta Suditalio, Bazilikato sentis la unuigon de Italio, en la 19a jarcento, kiel trudon.

La ideo de tiu artikolo ekestis tuj post la ĉi-jara Itala Kongreso de Esperanto, en *Policoro*, provinco de *Matera*, en Bazilikato. Je ĉiu nacia kongreso la italaj esperantistoj, laŭ iniciato de *Carlo Minnaja*, kutimas konigi la verkistojn de la regiono per diversaj tradukoj aŭ foje, kiel ĉi-jare, per aperigo de literatura antologio pri la kongresa regiono. Tre valora laboro, ĉar «en italaj antologioj malmulton oni trovas pri literaturo el la suditala regiono Lukanio.»



El Vikimedia. Aŭtoro: TUBS.

Bazilikato/Lukanio en suda Italio.




Mapo sennoma el planetabambini.it, adaptita al esperanto.

Kelkaj orientigaj punktoj en Lukanio.

Lukanio? Bazilikato?

Pri tio la “Lukana Antologio” (1) donas, en sia enkonduko, informojn interesajn por etnistoj: «Eĉ la itala nomo balanciĝas inter *Lucania*, latindevena kaj uzata dum la romia epoko kaj ankaŭ dum jarcentoj poste, kaj *Basilicata*, grekdevena kaj uzata kiam tiu regiono estis sub dominado de la bizanca imperio.» Ne ekzakte la samajn teritoriojn kovris tiuj du nomoj laŭlonge de la jarcentoj, rezulte de la militkonkeroj kaj laŭ la diversaj administraj subdividoj. La plej populara kaj plej longe uzata estas *Lucania*, tamen la oficiala nomo estas nun *Basilicata*. La regiono neniam ĝuis aŭtonomecon disde ŝtato, regata de la Napola reĝejo, de franca kaj poste hispana dinastio por fine aparteni al la piemonta-sardia, fakte savoja ŝtato. Lukanio poste fariĝis parto de Italio per plebiscito en 1861. «La aneksado de Lukanio tamen ne estis akceptita facile de la loĝantoj: la nobela, la burĝa kaj eĉ la proleta kamparana klaso, kiu ĉiam estis ekspluatata, ribelis, pli malpli eksplicite, pli malpli videble, kontraŭ ĉi tiuj novaj mastroj.» Malgraŭ la provoj de la nova registaro kunresponsigi la plej elstarajn homojn de tiu konkerita sudo, «el la popola kaj kamparana tavolo evoluis banditismo, kiu havis plenan karakterizon de intercivitana milito»; kvankam subpremita de la registaro, tiu ĉi ribelado daŭris ĝis proksimume 1865. Sed la tiel nomata “suda problemo” restis unu jarcenton plian ĝis la serioza agrara reformo, kiu alvenis nur en 1947. Sed eĉ post tio plu ekzistas “problemo de la sudo” en Italio.



Kovripaĝe: lukana pejzaĝo de la fenestro de la loĝejo de Carlo Levi en Aliano.

La regiono ne grandas, reprezentante 3% de la tuta itala teritorio. Ĝia loĝantaro estas koncentrita en la grandaj centroj, 56% okupas la 12 plej grandajn urbojn kaj en tiuj ĉi ni povas observi kreskon de la loĝantaro, precipe en la ĉefurbo, *Matera*. Sed la tuta regiono plu suferas pri senpopoliĝado. En 2008 la loĝantaro malkreskis de 662 unuoj kompare kun 2007.

La plej signifa lingva minoritato estas tiu de la arbresoj (*arbëreshë*), ĉefe en la provinco de *Potenza*. (2)

Ekonomie Bazilikato ja estas ankoraŭ unu el la plej malriĉaj regionoj de Italio, sed ĝia ekonomia nivelo kreskis en la lastaj 20 jaroj. Ĝia enregiona malneta produkto atingis po € 19.039,10 en 2008, kio egalas al 72,46% de la itala tutlanda malneta produkto, je la kvara pozicio en Suditalio post Abruzo, Sardinio kaj Molizo. Pri la kaŭzoj de tiu tamena postresto studadis historiistoj, filozofoj, sociologoj kaj politikistoj. Sed ankaŭ verkistoj, kiel ekzemple *Carlo Levi*, origine el Torino kaj sendita de la faŝistoj en ekzilon al la lukania vilaĝo *Aliano*. Per sia fama romano, “Kristo ne pluiris post *Eboli*” (3) li konigis la regionon al la tuta mondo.

Ene de la antologio


«Ĉi tiu antologio rilatas al la literaturo de la regiono esprimata per la itala lingvo aŭ per iuj lukaniaj dialektoj, cetere forte malsimilaj inter si, ŝulde al

izoliteco sur la montetoj de la diversaj vilaĝoj.» Oni trovas verkojn ekde la 16a jarcento, «kiam jam la itala lingvo estis formiĝinta kiel akceptiĝo de la toskania» kun aparta atento al la 19a kaj 20a jarcentoj kaj kelkaj novaj verkoj el la 21a. «Interese, ke realproksimiĝo al la dialekto kiel arta esprimilo, eĉ skriba, estas afero de la lastaj jardekoj, videbla ankaŭ en aliaj regionoj kaj ĉe aliaj minoritatoj.» Kaj la aŭtoro aludas pri alia sia verko: “Trentlando – Verkistoj, legendoj, kantoj” (4), por kiu li tradukis ankaŭ el la loka lingvo.

Carlo Minnaja finas sian enkondukon per jena rimarko: «Neniu el la aŭtoroj de la postaj paĝoj estis tradukita al esperanto, eĉ ne fragmente, kaj la traduko el la dialektoj bezonis aparte skrupulan flegon; tial ĉi verko devas esti konsiderata originala omaĝo al la beletra arto de regiono ne tre konata, sed tre koninda.»

Albino Pierro

25 aŭtoroj estas prezentitaj, ekde la 16a jarcento ĝis la 21a, kaj la tuta antologio ege legindas, sed por la legantoj de *Etnismo* mi elektis paroli pri la poeto *Albino Pierro*, naskiĝinta en 1916 en la lukania vilaĝo *Tursi* kaj mortinta en 1995 en Romo, kie li doktoriĝis pri filozofio en 1944. Li komencis sian poezian produktadon en 1946, kaj en 1959 li decidis ekuzi la dialekton de sia vilaĝo, «kiun li fakte rekreas skribe» en sia poemaro *A terra d'u ricorde* (la tero de la memoro) (5), kiu aperis en 1960. Ĉiujn siajn poemojn oni kunigis en du volumoj, *Tutte le poesie* (Ĉiuj poemoj) (6). Internacie fama, nur en 1976 li estis rekonita per la premio *Carducci* (7) kaj dufoje, en 1986



El tursi.info. Aŭtoro : Nicola Crispino.

Albino Pierro.



Foto de la aŭtoro.

Kruta malsupreniro en la stratetoj de Tursi.

kaj 1988, li estis kandidatega al Nobel-premio pri literaturo. Multe tradukita al la sveda, li estis invitita al la universitato de Stokholmo kaj nomita Doktoro *honoris causa* ĉe la Universitato de Bazilikato en 1992. Post lia morto lia vilaĝo Tursi kreis literaturan parkon dediĉitan al li, kun regulaj prelegoj kaj kulturaj eventoj, muzeo kaj biblioteko kun miloj da libroj.

Quanne i'ère zinne Kiam mi infanis

Kiam mi infanis
mi restadis enĉambre,
en mallum' la okuletoj
jukis ruĝaj kovritaj
de urtiko.
Diradis vilaĝanoj,
ke mi blindiĝos.
Sed mi prifajfis: mia orelo
kuŝis ĉe la suno;
mi aŭdis la bubojn
ludi glitresalton, malpaciĝi
kaj rajdi gaje sur porko;
poste ili ŝiris herbon de l' ĉevalinoj
de l' kamparano kaj ekludis
herbŝalmojn.

El la Lukana Antologio,
tradukis el la dialekto Nicola Ruggiero.

El la libro "Portreto de Poeto"

En librejo de *Matera*, ĉefurbo de Lukanio, mi trovis verkon de ĵurnalisto ĉe RAI (Radiotelevido Itala), *Rocco Brancati*, "Portreto de poeto, *Albino Pierro*" (8).

«Tiu ĉi eseo kompletigas studon komencitan per retejo kaj la kompaktan diskon *Do you speak tursitano?* (Ĉu vi parolas la tursian?) (9), ambaŭ eksterordinaraj rimedoj de la moderna teknologio por disvastigi kaj konigi tra la sonoj, la bildoj, la skribo, la verkon de poeto, kiu eble povus forgesiĝi, kiam neniu plu scios interpreti lian malfacilan dialek-ton.»

Ekde nun mi larĝe inspiriĝos de tiu ĉi teksto por paroli pri la poeto kaj el ĝi citos tekstojn de *Albino Pierro*.

Naskiĝo

«Nia domo, nia palaco staras en la kvartalo *La Rabatana*, la malnova historia centro fondita de la saracenoj. Malfirme ĝi demetitas sur argila monteto kaj ĉiam estas tie, preta gliti alvalen laŭlonge de la "kalankoj". Mi amis la domon, Rabatanon, la kamparon kaj la monteton» Tie, en la vilaĝo Tursi, naskiĝis *Albino Pierro*, la 19an de novembro 1916.

Li mem rakontas: «Oni min taksis morta kaj jam vestis kaj metis min en la ĉerkon. La nutristino, iu el la bravaj virinoj de Tursi, kiu vartis min (sed ŝi ne havis multe da lakto kaj por mamsuĉado mi estis donita al la virinoj de la vilaĝo, naskintaj antaŭ nelonge), la *mammana*, diris mi, vidante min tiel inertan kiel povra fringelo murdita de improviza hajlado, diris, ke ŝi aŭdis, je momento, la voĉon de mia povra morta patrino: *U piccininne è vivo*, la knabeto vivas!

Tiu ĉi krio ja skuis min tiom, ke ĝi revokis min en ĉi tiun mondon, Mi naskiĝis plian fojon.»

De preskaŭ blindiĝo al legado, de profesia vivo al poeziado

La eta *Albino* ofte suferis pri ruĝiĝo de la okuloj. Li rakontas, ke lia nutristino provis kuraci lin per popola rimedo, kataplasmo el urtikoj. «Sed la aferoj pligraviĝis. Je la kvar- aŭ kvinjariĝo, kvazaŭ blinda, ĉiam en la mallumo, mi eklernis ludi mandolinon. Poste mi ekkantis kaj kun miaj fratoj ni koncertis en la vilaĝo.» Sed tiu handikapo ne daŭris: «Feliĉe okulisto el Romo forigis la plej gravan minacon»

La infano povis legi tiom, ke li fariĝis universitata profesoro ne blinda. Kaj al mi malfermiĝis la hejma biblioteko kaj tiu eĉ pli riĉa de la gekuzoj *Capitolo*»

Albino Pierro tiom amis la lokojn de sia infaneco, ke tiuj ĉi lokoj vivadas okupante la unuan lokon en lia tuta verko. «Estas perdita vilaĝeto, kiel multaj aliaj en la profunda sudo, kie oni paroladis nur en dialekto taksata de la aliaj kiel malfacila, eĉ ne prononcebla fremda lingvo, sed kiun mi bone komprenis, kvankam hejme necesis paroli itale. Nun ke malaperis la dialektoj, en *Tursi* oni ne plu parolas la tursian. Plaĉis al mi la sonoj de mia infaneco kaj de miaj ĉirkaŭuloj. Hazarde mi poste decidis uzi la dialekton, sed nun tio ŝajnas al mi natura.»

La poeto naskiĝis en nemalriĉa familio, familio "sinjoreca", kies domon oni nomis "palaco". La patro estis terposedanto kaj lia patrino estis instruistino. Kiel oni povas kompreni el lia rakonto de sia naskiĝo, raportita pli komence de tiu ĉi artikolo, ŝi mortis je, aŭ tuj post lia ekvivo. Li estis la plej juna post du fratoj, *Mario* kaj *Maurizio*. La tri infanoj estis verŝajne edukitaj de la patro kaj de onklinoj. Post la elementa lernejo la eta *Albino* sekvis la kursojn de katolika kolegio en Taranto, poste en Salerno, kie instruisto pri la angla vekis lian intereson pri poezio kaj klasikaj tekstoj. Li ne estis aparte bona lernanto, tiel ke la patro metis lin en internulejon pli proksiman, en *Policoro*, el kie li plurfoje fuĝis. Lia kuzo, *Guido Capitolo*, prenis lin kun si al la urbo *Sulmona* in Abruzzo, ĉirkaŭ 300 km for, kie tiu kuzo instruis filozofion. Tie *Albino* sekvis la unuan jaron de la liceo. La disiĝo disde lia vilaĝo estis ege ŝoka por *Albino Pierro*, kiel li mem raportas: «Mi multe suferis, kiam mi devis translokiĝi por daŭrigi miajn studojn... Mi fuĝis plurfoje el la kolegioj, ĉar plaĉis al mi legi, ne studi.»... «Post mia unua jaro en la liceo, mi sekvis mian kuzon al *Udine*, ĉirkaŭ 500 km pli norde, kie mi ĉesis iri al la lernejo. Finfine mi ne povis fari ion alian ol legi: *Benedetto Croce*, la filozofojn, eksterlandan literaturon. La libroj alvenis al mi amase.» Li lernis la germanan, pianludon, enamiĝis al estonta kantistino. Sed la ideo poeti plu enradikiĝis en li. Finfine li decidis studi pedagogion kaj filozofion en Romo inter 1939 kaj 1944, kun la celo trovi fiksan laborpostenon. «Mi travivis la militon sen kompreni ion ajn.» Li verkis por gazetoj, inter alie poemon okaze de la morto de la filo de *Mussolini*. Li edziĝis kun *Elvira Nardone*, kun kiu li ekhavis filinon, *Maria Rita*. Ekde 1945 li instruis filozofion en liceo de Romo kaj estis nomumita

Kalankoj

La vorto "kalanko" ne ankoraŭ ekzistas en PIV. Kaj eĉ en niaj etnaj lingvoj malfacilas trovi komunan difinon pri ĝi. Ĉiuj artikoloj de Vikipedio (kaj ili malmultas) parolas pri la "kalankoj" de suda Francio kaj de Korsiko, difinante ilin kiel apartan geologian formiĝon, kiu kreas profundajn kaj krutajn valetojn, parte kovritajn de la maro kaj situantajn, laŭ tiu ĉi formo, sur la bordoj de Mediteraneo. Tiuj mediteraneaj "kalankoj" estis kavigitaj en rezista kalka ŝtono aŭ granito.

La geologia difino de la lukanaĵ "kalankoj" tute malsamas, kaj en itala vortaro oni legas: «Proeroda sulko rezultanta de pluvaj akvoj sur argila montoflanko, ne trairebla kaj diserigema facile diserigebla». La etimologio, kiu povus doni al ni iun pli ĝeneralan signifon de tiu vorto, mankas laŭ la itallingva vortaro, kaj por la "mediteraneaj kalankoj" oni indikas, ke la vorto venas el la okcitana kun la signifoj "kruta deklivo, mallarĝaj stratetoj, kreko". Ĝi atestiĝas je 1268-69 kun la senco "pado". Ŝajne ĝi estas kunmetita el la radiko *cala* aŭ *cara*, signifanta "malsupreniri" aŭ "kruta deklivo", kaj el tiu radiko, kiu troveblas ankaŭ fine de "lavango" aŭ de la franca "*avalanche*". Sed estas interese kompletigi tiujn informojn per tiu, trovita inter la informoj pri la dialekto de *Tursi*, kie oni mencias la vorton "kalanko", adoptitan el greka dialekto. Tute eblas, ke ankaŭ la okcitanoj ĉerpis la vorton el la greka, kaj ke la komuna signifo baziĝas sur la koncepto de "deklivo".

ministra inspektoro en 1971. Tiujare li decidis dediĉi sin plentempe al la poezio.

Poezii en dialekto

«Kaj tio estas lingvo, kiun iel inventis mi, ĉar ne ekzistis modeloj al kiuj mi povus referenci por transskribi, por doni skribmanieron al tiu lingvo. Ne ekzistis literatura tradicio por tiu ĉi lingvo, tial mi iĝis komplete libera esprimi tion, kion mi deziris esprimi.



Aŭtoro: Alain Favre.

Memortabulo sur la naskiĝdomo de Albino Pierro.

«Mi volus reiri por ĉiam, kien fluas, kiel akvo inter la krutaĵoj, mia vivo.»

La dialekto konsekvence estas lingva rimedo, esprimrimedo, kiun mi uzis por fari poezion Mi ne estas dialekta poeto, mi estas poeto, kiu uzas la dialekton de sia vilaĝo por fari poezion.»

«La okazo ekestis dum unu el miaj disiĝoj de *Tursi* pli malpli angorigaj. Ĉiufoje kiam mi devis forlasi la vilaĝon por iri al kolegioj, mi estis kaptita de tragediemo. Tiun ĉi fojon, kiam mi pretiĝis foriri, septembre de 1959, mi suferis pli ol kutime. La vesperon antaŭ ol forveturi mi supreniris al la unua etaĝo de la domo kaj tie kuŝis longe, sed tiam mi ne pensis, ke mi povus verki dialekte. Mi forveturis al Romo kun tiu ĉi angoro en la animo kaj la vesperon venis al mi la ideo verki poemon en dialekto, *Prima di parte* (Antaŭ ol forveturi).

Prima di parte Antaŭ ol foriri

La nokton antaŭ ol foriri
mi alsupris la balkonon
aŭdi la ĉirpojn de l' griloj
kaŝiĝintaj en la nigro de l' montoj.
Luno blanka kiel la neĝo
blankigis la tegolojn de l' konvento
sed ĉe mia palaco
ĉiuj balkonoj vakis.

El La Lukana Antologio,
El la dialekto tradukis Nicola Ruggiero.

Estis mia unua poemo en la dialekto je la 23a de septembro 1959, kaj poste dum tri monatoj oni povis vidi min en la stratetoj de Romo kun krajono kaj paperpeco. Kaj ekestis *A terra d'u ricorde* (La tero de la memoraĵoj) (5).»

La lingvo «de *Tursi*, mia vilaĝo en la provinco *Matera*, estis unu el tiom da idiomoj malaperontaj. Mi devis trovi rimedon por fiksi surpaperen la sonojn de mia popolo... Aliaj dialektoj, la venecia, la milana, la roma, la sicilia, havas grandan poetan tradicion. Mi ne havis modelojn. Kiel skribi ekzemple la artikolon, kiam ĝi perdas la literon -l-, kiel la tursia? Kaj kion pri la verboj, iliaj konjugacioj, iliaj tempoj, la lingvaj reguloj, malkovrendaj aŭ kreendaj?»

Albino obstine ripetas, ke por li lia dialekto estas nur literatura instrumento. «La dialekto foje estis konceptata kiel rimedo naturalisma, uzebla por priskribi, karakterizi iun regionan kaj kamparanan medion kun ĝiaj medioj kaj ĝiaj homoj.

La dialekto ekzistis jam por poetoj de la 19a jarcentiĝo, kiuj ĝin uzis kiel rafinitan lirikan rimedon...»

«... Estas lingvaĵo arkaika, tian lingvaĵon uzis poetoj por krei al si kvazaŭ eblon de saviĝo, fronte al la krizo de la poezio.»

Albino Pierro sentas sin for de la vivo, tio estas de lingvaĵo koncernanta la uzon ĉiutagan kaj ŝarĝitan de tiuj ĉiutagaj konvencioj. «Pro tio, por mi, la dialekto iĝas ia “libera tereno” ebliganta liberan kreadon.»

Tamen *Rocco Bracanti*, la aŭtoro de *Ritratto di Poeta* (8) raportas, ke en 1991, dum ricevo de la premio “Vivo por Lukanio”, *Albino Pierro* esprimis, ke en sia dialekto li pro-vis retrovi sian personan pasintecon sed ankaŭ tiun pli foran kaj praan de sia gento.

Unu jaron poste en alia intervjuo, *Albino Pierro* deklaris, ke «la dialektoj certe, en proksima estonteco, ne plu ekzistos kiel kutima komunikilo sed pluivivos kiel privilegiitaj esprimiloj dediĉitaj al poezio, ĉefe lirika.»



Fotis la aŭtoro.

Al La Rabatano, tutsupren!

Pli konkrete, kio estas tiu tursia dialekto?

Koncerne la dialekton uzatan de *Albino Pierro*, oni ofte parolas pri iu *neolatino protostorico* “prahistoria novlatino”, pri iu naskiĝanta “nova latino” uzata ekde la Itala Renesanco, pri arkaika kaj malfacila dialekto.

En Vikipedio oni unue trovas ĝin sub la nomo de la apuda municipo, *Metaponto*, la metaponta dialekto, de kiu la tursia ŝajne diferenciĝas nur per etaj variaĵoj (kvankam *Albino Pierro* parolas pri ĝi kiel tre malsimila al la ĉirkaŭaj dialektoj): ene de la vortoj la vokaloj -a- prononciĝas kiel -e-, kaj oftas vortoj finiĝantaj per la konsonanto -s-.

Ĝi apartenas al la lukana variaĵo de la napola lingvo (10) aŭ dialektaro de Suditalio. En ĝi oni evidencigas la areon de la arkaika kalabria-lukania areo, nomata ankaŭ Laŭsberga Areo, ĉar ĝi estis studata de la germana lingvisto *Heinrich Lausberg*. Tiu ĉi areo kunigas la sudokcidenton de Bazilikato al la nordo de Kalabrio. Ĝi situas meze inter la komunikaj vojoj ligantaj Kalabron al Salerno kaj ĉefe al Napolo; temas pri transira regiono, en kiuj la dialektoj hibridiĝas kaj diferencas de municipo al alia. La origina lingvo de tiu suda Lukanio estis, antaŭ la greka, la oska-lukana (11), kiu lasis spurojn en la dialektoj de tiu regiono. Ekzemplo estas la formoj “*asuliare*” aŭ “*asulare*” (en la itala “*ascoltare, orecchiare*”), kiuj devenas el la oska “*ausis*” anstataŭ el la latina “*auris*”. Poste la greka estis aparte grava en la metaponta regiono, kiu tiam apartenis al Granda Grekio (*Magna Graecia*) ekde la 7a jarcento a. K. Pluraj spuroj de la greka lingvo restas en la metaponta dialekto, ekzemple “*calanchē*”, “*kalanko*” kaj “*carusē*”, kombmaniero. Nur poste venis la latina. Ankaŭ la franca kaj la kastilia lingvoj influis la regionon laŭ la diversaj okupacioj.

Kiel legi la poemojn de *Albino Pierro*?

Rocco Brancati avertas nin: «certe la dialekto de *Tursi*, por nordulo, eĉ bonvolema, estas unu el la plej malfacilaj. Kaj ankaŭ la plej fidelaj legantoj de *Pierro* dubas posedi taŭgajn ilojn por kompetente taksi lian poezion, kiun ankaŭ ni [la aŭtoro, Ndr], fakte, ne kapablas legi sen la helpo de la traduko.» Ĉar kompreneble ĉiuj poemoj publikiĝis kun apuda itala traduko farita de la aŭtoro.



Foto de la aŭtoro.

La kalankoj, proksime de Tursi.

Albino Pierro mem diris, ke kiu volas legi liajn poemojn devas havigi al si la necesajn ilojn, komencante per *Concordanze* (11).

Mi devas konfesi, ke por verki tiun ĉi artikolon mi kontentiĝis per la tradukoj esperantlingvaj, kiuj vekis en mi la emon pli bone koni la poemojn de *Pierro*, kaj la itallingva traduko kapablis min enamigi al tiuj poemoj, plenaj je lukana pejzaĝoj kaj sentoj. Verŝajne la fakto, ke *Pierro* unue verkis en sia dialekto kaj mem tradukis al la itala, ebligis al li transmeti siajn unue endialektajn sentojn al la itala. Mi multe ĝojis, kiam mi povis trovi surrete registraĵojn de liaj poemoj en la



Foto de la aŭtoro.

Pado en la Tursiaj kalankoj.



Foto de la aŭtoro.

Luneca pejzaĝo en la Turisiaj kalankoj.

Ŝtonrompisto

Vi rompas, ŝtonrompisto, eĉ se trista,
kantante ŝtonon, kaj fordiserigas
per la male' frapanta feran nodon
de l' dolor' kiu sin alkroĉas gorĝen
kaj animen.

Ne tiel mia kanto
fluganta kiel ondo da parfumo
el marĉo aŭ samkiel preĝej-ĉanto
el taverno. Kaj soras al la suno
ĝin varmiganta; soras al la vento
iganta ĝin belsona, vastiganta
ĝin en la lum' kiu pli luma iĝas;
mi restas ĉi, simila al la kano
gutanta treme, post nimbus', vespere.

Ho ŝtonrompisto, kiom vian kanton
mi envias al vi; vi krudan ŝtonon
de la monto kaj de l' dolor' frakasas
ŝanĝante ĝin al kanto de martelo
kiu malnodas, rompas.

Male, kanto
mia ekflugas kaj min lasas, kiel
iriskolora birdo de fabelo
el nub' saltanta kaj celanta sunen.

El la Lukana Antologio,
tradukis *Carlo Minnaja*.

tursia dialekto, eĉ se dialekta legado troviĝas nur komence kaj mallongas. (13).

En Stokholmo

En sia "Portreto de Poeto" (8), *Rocco Brancati* dediĉas plurajn ĉapitrojn al la medio de la Nobel-premio kaj ties grandnombraj intrigoj, inter kiujn ŝoviĝis, en la tempo de la kandidatigo de *Albino Pierro*, intrigoj propraj al italoj.

En 1985 unuafoje alvenis la nomo de *Pierro* inter la kandidatoj al la Nobel-premio. Tiujare la kandidatoj atingis la rekordan nombron 179.

Albino Pierro malgraŭvole estis enplektita en kverelojn inter la eldonejo

Italica, fondita kaj prezidata de la verkisto kaj tradukisto *Giacomo Oreglia*, kaj aliflanke la Instituto Itala de Kulturo, kiu dependas de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj.

La svedojn fascinas la itala literaturo. Inter ili multaj italistoj studas la grandajn klasikulojn italajn kaj multaj el tiuj fakuloj membras en la Sveda Akademio, kiu atribuas la literaturajn Nobel-premiojn. Teksiĝis fortaj ligoj inter la membroj de tiu akademio kaj la italo *Giacomo Oreglia*, kiu aperigis italajn verkojn tradukitajn al la sveda kaj svedajn al la itala. Ĝi eldonis verkojn de poetoj klasikaj kaj modernaj, interalie tiujn de la toskana poeto *Mario Luzi*. En 1981 tiu ĉi eldonejo estis «grava pordo por la kandidatoj al la Nobel-premio». Aliflanke la Instituto Itala de Kulturo, estis akuzita favori elitajn konceptojn de la kulturo, kiu ekskludis larĝajn faskojn de la itala kulturo. *Emilio Colombo*, tiam ministro pri eksteraj aferoj, mem el Lukanio, forte deziris prezenti kandidaton el sia regiono. Li proponis *Albino Pierro* al la Nobel-premia kandidatigo. Kaj *Pierro* suferis de tiu subteno kaj nejuste konsiderita kiel proksima al la Instituto Itala de Kulturo kaj "favorata" de la itala ŝtato. Li tiel troviĝis en opozicio al la toskana poeto *Mario Luzi*, mem kandidato ekde la jaro 1982, kiam *Albino Perro* estis invitita al kolokvo en Svedio. *Mario Luzi*, same internacie konata kaj meritanta la Nobel-premion, estis subtenata de la eldonejo *Italica*.

La jaroj intersekvis sin sen ke itala verkisto ricevu la premion, ĉu al tio influis la interitalaj kvereloj? Al *Pierro Albino* ŝajnis negrava la manko de rekono flanke de la Nobel-medio, sed li ege suferis pro la akuzoj longe ŝveligitaj en la itallingvaj gazetoj.



Giacomo Oreglia.

Pripensoj kaj konkludoj

Mi elektis paroli pri tiu temo unue ĉar mi estis forte logita de la poezio de *Albino Pierro*, pro ĝia enradikiĝo en la fascina lukana pejzaĝo, sed ankaŭ ĉar mi parolas lokan dialekton de la arpitana (15), kaj, sen esti poeto, okazas al mi verki tekstetojn aŭ traduki literaturajn tekstojn al la arpitana. Same kiam mi legas tekstojn iom literaturecajn en tiu dialekto kamparaneca, mi aparte ĝuas la uzon de vortoj proksimaj al la tero por temoj abstraktaj, esprimantaj ne nur kamparanecajn aŭ, kiel ofte, ironie ŝercajn rakontojn. Mia dialekto ja posedas skribmanieron, sed ne fortan literaturan tradicion, kaj mi ankaŭ povis sperti, ke esprimiĝi en ĝi liberigas la kreemon. Ankaŭ la pripensoj de *Albino Pierro* pri kreado de skribmaniero proksimas la zorgojn de la arpitanoj, kies dialektoj posedas propran skribon, plej ofte fonetikan, kaj pro tio ili estas malfacile kompreneblaj por parolantoj en aliaj dialektoj. Lingvisto kreis superdialektan ortografion, kies etimologieco helpas komprenon sed malhelpas legadon kun la ĝusta prononco, fakte kiel en la franca aŭ la angla. Por *Albino Pierro* gravis noti la sonojn, ĉar grandparte pro

sonaj belecoj li elektis sian dialekton, tial lia skribmaniero fonetikas.

Male al *Albino Pierro* mi deziras, ke mia lingvo plu vivu, kaj mi provas uzi ĝin kiel normalan komunikilon. Mi demandas min ĉu eblas uzi longe dialekton mortan aŭ mortiĝantan, for de la ĉiutaga vivo, kiel literaturan esprimilon. Ĉu la valoro de tiu lingvo ne kuŝas ĝuste en ĝia uzo, eĉ se pasinteco, en la normala vivo? Sian dialekton *Pierro* uzis kiel infano, kiam tiu lingvo estis ankoraŭ parolata inter la loĝantoj de sia vilaĝo. Li uzas lingvon, kiun li aŭdis en la ĉiutaga vivo, por literatura celo. Sed ĉu dialekto tro longe disigita de la reala vivo ne perdas valoron ankaŭ por literaturo? Kiam li diras, ke ĉiuj dialektoj mortas kiel komunikiloj kaj estos uzataj nur de verkistoj, mi malfacile povas imagi, ke oni povu skribi poemojn en lingvo uzata nur por literatura celo kaj krome ankoraŭ dum longa tempo.

Aliajn demandojn vekis miaj legadoj pri *Pierro*: li sentas sin ligita al la variaĵo de sia vilaĝo, kiel multaj dialektoparolantoj, kiuj rifuzas vidi, ke ilia dialekto apartenas al pli granda tuto, al iu lingvo kies dialektoj povas iel interkompreniĝi. Iel mi povas tion kompreni, ĉar en la propra dialekto mem kuŝas la plej granda subtila riĉeco, perdata kiam oni parolas kun samlingvanoj el aliaj variaĵoj. Tamen ekzistas ankaŭ la ĝojo kompreniĝi kun najbaroj el proksima regiono, la ĝojo malkovri ilian uzon. Eĉ foje utilas trovi en la dialektoj de aliaj ion, kio mankas en la nia. Oni devas trovi ekvilibron inter tiuj du tendencoj kaj konscii, ke por vivi lingvon oni pli fortas kune, sed tio ne estis la celo de *Albino Pierro*, kiu ŝajne parolis dialekton aparte malsimilan al la najbaraj. En tuj sekva artikolo mi revenos al tiu ĉi temo per intervjuo de vaŭda kantisto, kiu elektis kanti en la vaŭda variaĵo de la arpitana.

NM

Notoj:

- (1) Lukana Antologio, *Carlo Minnaja*, eld. Itala Esperanto-Federacio, Milano 2017.
- (2) Vidu la aperintan artikolon: "La arbreŝoj el Sicilio", *Etnismo* n-ro 91 p 16-22. Konsultebila sur la retejo etnismo.org
- (3) En la itala: *Cristo si è fermato a Eboli*, kion oni ankaŭ povas traduki laŭvorte "Kristo haltis en Eboli". Oni povas legi en la retejo de *Cina Radio Internacia*, pri la ronda tablo okazinta dum la Itala kongreso en la literatura parko *Carlo Levi*. <http://esperanto.cri.cn/2521/2017/10/11/241s195341.htm>.
- (4) Itala Esperanto-Federacio, Milano 2014.
- (5) *A Terra d'u Ricorde (La Terra del Ricordo)*, eld. *Il nuovo Belli*, Romo 1960.
- (6) Eld. Salerno, Roma, 2012.
- (7) Literatura premio pri poezio iniciatita de la municipo *Pietrasanta* por honori la poeton *Giosuè Carducci*, civitanon de ĉi municipo.
- (8) "Ritratto di Poeta, *Albino Pierro, Intrigo a Stoccolma*", *Rocco Brancati*. Eld. RCE, Napolo 1999.
- (9) Malfeliĉe mi ne trovis spurojn de tiu DVD sur la reto.
- (10) Ne miksu kun la napola dialekto, temas pri nomo donita al suditalaj lingvoj. eo.wikipedia.org/wiki/Napola_lingvo
- (11) eo.wikipedia.org/wiki/Oska_lingvo
- (12) *Concordanze lemmatizzate delle poesie in dialetto tursitano di Albino Pierro, Volume 1*, *Vincenzo Tisano*. Tezo en la Universitato de Pisa. Temas pri iu vortaro tursia/-itala.
- (13) vimeo.com/62408926
- (14) La arpitana aŭ francprovenca estas latinida lingvo meze inter la okcitana sude kaj la ojla lingvoj norde. Ĝi parolatas/is en Romandio (nun franclingva Svislando), en Savojo kaj diversaj orientaj regionoj de Francio, en Aosta valo, kelkaj valoj de Piemonto en Italio kaj du municipoj de Apulio. Tiu lingvo estas parolata nur laŭ formoj de lokaj dialektoj interkompreneblaj kun iom da alktimigo. La dialekto menciita en tiu ĉi artikolo estas tiu de la vaŭda kantono en Svislando.

Nicole Margot

Intervjuo de la vaŭda kantisto *Lo Tian*

Lo Tian estas pseŭdonimo el kutima karesnomo vaŭda de "Christian". Sur la Reto vi povas trovi informojn pri li kaj la 3 muzikistoj, kiuj lin akompanas: «*Lo Tian 4tet. Groove Rural francoprovençal (patois vaudois)*». Tio estas: *Lo Tian* kvaropo, muziko kamparaneca, francprovenca (vaŭda dialekto).



Foto de la aŭtoro.

Lo Tian 4tet muzikas en la savoja urbeto Yvoire, kie vaŭda grupo vizitis savojan arpitnanparolantojn. Lo Tian kantas akompane de gitaro.

Kiel vi scias, la arpitana lingvo estas parolata nur en siaj diversaj dialektaj variantoj. Kaj en Romandio ĝi estas konsiderata kiel pluviva nur en la valeza kaj friburga kantonoj. La ĝenevanoj uzas ĝin nur kantante sian nacian himnon en la arpitana, *Cè qu'è lènaŭ* (Tiu, kiu estas supre). En la vaŭda kanto ekzistas asocioj, lingvaj kursoj, eĉ eta gazeto. La dialektantoj ĝenerale skribas, legas, kantas kaj foje rakontas en la vaŭda dialekto, sed malmultaj kapablas esprimiĝi pri ĉiuj temoj en ĝi. Mi apartenas al tiuj, kiuj provas instigi al pli ofta uzado kaj parolado kaj inter ni, *Lo Tian* aŭ *Christian Lambelet* estas tiu, kiu plej ofte kaj plej flue parolas nian dialekton, kaj feliĉige puŝas nin antaŭen al parolado.

La sola ligo inter la poeto *Albino Pierro* kaj *Lo Tian* estas ilia komuna elekto uzi sian dialekton por verki ĉu poemojn ĉu kanzonajn tekstojn.

Etnismo:

- *Lo Tian*, se mi ne eraras, vi elektis verki en nia dialekto antaŭ ol ĝin paroli. Ĉu vi povas diri, kio unue instigis vin al tio?

- Mi elektis verki miajn kanzonojn en nia dialekto post plurjara aŭskultado de "reggae" (regeo), en kiu oni multe parolis pri radikoj, pri kono de propra historio, pri propra origino. Kaj ankaŭ kiam mi vivis en Brazilo mi povis konstati la forton de la lokaj muziko kaj kulturo, en kiuj miksiĝas la lokaj radikoj kaj la hodiaŭa mondo.

Tial mi diris, ke se ili povas fari tion, kial ne mi?

Mi komencis samtempe kanti kaj ekparoli en la vaŭda. Komence tio ne facilis, ĉar mi devis traserĉi preskaŭ ĉiujn vortojn en la vortaro aŭ la gramatiko. Tio kostis multe da tempo por atingi rezulton kaj necesis, ke iu korektu. Poste mi devis rekomenci multfoje por ke ne estu eraroj. Nun mi verkas spontane en la dialekto ĉar mi pensas en ĝi, mi ne bezonas la francan.

- Nun ke vi estas plensperta kantisto, ĉu vi pensas, ke nia dialekto alportas al viaj kanzonoj ion plian ol se vi verkas franclingve? Kion ĝi alportas? *Albino Pierro* sentis sian dialekton arkaika, kio veras ĉar en ĝi oni retrovas vortojn de lingvo parolata antaŭ la greka. Nia lingvo

venas ĉefe de la latina kaj posedas tre malmulte da spuroj keltaj sed ni tamen diras, ke ni parolas maljunan lingvon. Ĉu vi ŝatas, kio maljunas en nia dialekto?

- Por mi verki kaj kanti vaŭde estas iom kiel marĝena arto. En ĝi fortas energio kaj tiel mi esprimas tion, kion mi volas, per emocioj kaj per mia interno. Mi verkas ankaŭ laŭ maniero pli simpla kun bildoj kaj metaforoj, dum kiam mi verkas franclingve, estas pli "intelekte", mi ludas per la vortoj, per duoblaj kaj kontraŭaj sencoj.

Neniam interesis min io nur pro ĝia malnoveco. Afero interesas min ĉar en ĝi io min logas. Sed tutfunde mi ne tiom ŝatas la malnovajn aferojn. Mi estas "ĉi tie kaj nun".

- Nun la vaŭdan dialekton, kiu estas dialekto de la arpitana, vi flue parolas. Ĉu vi povus diri kio estas tiu lingvo por vi?

- Mi sentas, ke tiu lingvo estas en mia profundo ekde ĉiam. Mi kreskis ĉirkaŭata de multaj vortoj el tiu ĉi lingvo. Estas kiel se finfine mi trovis mian veran lingvon kaj komprenis el kie mi venas kaj mian pensmanieron.

- *Albino Pierro* ofte ripetis, ke por li lia dialekto estas nur literatura ilo, utila al la poeto por kvazaŭ savi la poezion, kiu estas en krizo, kiel libera areo, ebliganta plenliberan esprimigon. Li diris, ke li ne estas dialekta poeto sed poeto, kiu uzas la dialekton de sia vilaĝo por literaturumi. Ĉu vi sentas ion komunan kun tiu ideo?

- **Mi kredas, ke jes. Por mi temas nur pri tio, ke mi ŝatas verki en mia lingvo. Se mi estus sameo, mi verkus samee ktp... Kaj pro la historio kaj ĉio tia, mi havas du lingvojn: la francan, kiun mi vidas iom same kiel la francparolaj afrikanoj vidas ĝin, tio signifas kiel lingvon, kiun oni konas ekde la infaneco sed kiu, en la profundeco, ne estas vere onia propra. Male pri la dialekto, kiu, eĉ se lernata poste, sonas multe pli forte en mi.**

- *Albino Pierro* eĉ diris, ke ĉiuj dialektoj certe mortos kiel komunikiloj, sed plu vivos kiel poezia lingvo. Kion vi opinias pri tio?

- **La dialekta situacio malsimilas de regiono al alia sed mi iom timas, ke okazos tiel. Tamen mi deziras, ke la dialektoj restu longtempe komunikiloj. Ĉu mi revas? La problemo en la uzo nur literatura de morta lingvo estas, ke se neniu ĝin parolas, neniu ĝin lege komprenos. Nur lingvo-fakuloj ... Mi mem verkas en mia dialekto ĉar ĝi estas Mia lingvo (aŭ unu el miaj lingvoj), kaj tiel mi provas ĝin konservi viva ankoraŭ iom da tempo.**

- *Albino Pierro* estas tre ligita al la dialekto de sia vilaĝo, kiu, laŭ li, tute ne similas la dialekton de la najbaraj vilaĝoj. Veras, ke tiuj suditalaj dialektoj, laŭdire, tre diferencas unuj de la aliaj. Vi verkas en la vaŭda dialekto, sed mi scias, ke vi ankaŭ ŝatas paroli kun aliaj arpitanoj. Rakontu al ni pri tio. Ĉu vi povus, ekzemple, lasi vin influigi de la aliaj arpitanaj dialektoj por verki viajn kanzonojn?

- **Mi ĉiam provos resti plej eble proksima al "mia" dialekto, sed se mi bezonas vorton ne troveblan en la vaŭda, mi opinias pli bone preni alian arpitanan ol franclingvan. Kaj se iu esprimas belas en alia dialekto kaj povas esti komprenata de ĉiuj, mi ĝin uzos. Ekzemple en la vaŭda ni uzas la verbon *dèvesâ* por "paroli", sed kial ne foje uzi ankaŭ *prèiji*, kiel multaj arpitanoj diras.**

- Kaj por fini tiun ĉi intervjuon, mi ŝatus demandi al vi, kion pensas la junuloj, kiuj venas al viaj koncertoj, kiam en la vaŭda kanton malmultaj konas la ekziston mem de nia lingvo, ĉefe la junuloj?

- **Komence ili aŭskultas la muzikon sen scii en kiu lingvo mi kantas. Kaj se ili ŝatas la muzikon, ili informiĝas pri la lingvo kaj ĝenerale volas scii pli koncerne ĝin. La fakto, ke tiu lingvo estis malpermesita aparte scivoligas ilin... Mi opinias, ke nia dialekto interesas la junulojn. Kio ne interesas ilin estas la folkloro. Tial se oni faras per nia dialekto ion alian ol la kutiman folkloron, tio taŭgas al ili.**

Tradukita el la arpitana. NM

Lè pî dein lè fliâo Piedoj en floroj

Junkviloj antaŭ la porkeja benk'
Piedoj en floroj kaj menso for.
Tiel naskiĝas miaj kanzonoj

Kun multa amo
Aŭ ioma rabbio
Okulumante la boskojn
Povas mi plenigi paĝojn

Piedoj en floroj
Kaj menso for

Dum aĉjo kunligas frambojn
Kaj kaĉjo dormas ĉe figarbo
Mia koro krias kaj kraĉas vortojn, melodiojn

Tretante la tediĝon
Kaj la rutinon
Similas mi birdon
Aŭ infanon

Piedoj en floroj
Kaj menso for

Tiel naskiĝas kanzonoj miaj
Piedoj en floroj kaj menso for
Junkviloj antaŭ la porkeja benk' (2x)

El la vaŭda dialekto de la arpitana

Aŭskutebla je: <https://mx3.ch/t/COJ>



El la retejo: <https://mx3.ch/lotian>

Lo Tian, meze, kaj du du el siaj muzikistoj rande de vaŭda arbaro.

Valora tekstaro optimisma

Universala Esperanto-Asocio decidis festi la kvindekjariĝon de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj kaj la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj per ilia traduko kaj publikigo en Esperanto. Entute ili aperas en unu broŝuro, enhavanta enkondukan prezenton de *Rafaela Urueña*, profesoro pri internacia juro, la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj la du Paktojn. Dum la Deklaracio estas delonge tradukita al Esperanto, la Paktoj ne estis. Oni ĉi tie eldonis ilin en elstara redono de *Humphrey Tonkin*, kiu konstituas gravan riĉigon de la jura terminologio en Esperanto.

Kvankam la lego de la Paktoj estas tre rekomendinda por ĉiu interesito pri homaj rajtoj, verŝajne la plej interesa ero en la tuta broŝuro estas la enkonduka eseo de prof. *Urueña*. Temas pri informriĉa prezento de la evoluo de la koncepto pri homaj rajtoj, kaj ĉefe prezento de ĝia jura materiigo. En ĝi estas interalie klarigite, ke la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas, ho ve, simpla deklaro, kiu enhavas neniujn efektivajn devigojn por la ŝtatoj. Ĝuste pro tio la Paktoj estas grava paŝo antaŭen, ĉar ili principe forigas tiun mankon. Kiel *Urueña* klarigas, «[e]nkadre de la tiama malvarma milito inter la membroŝtatoj de Oriento kaj Okcidento, evidentiĝis malkonsento pri prioritatoj: la “orientanoj” konsideris pli gravaj la ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn rajtojn, kaj “okcidentanoj” la civilajn kaj politikajn rajtojn» (p. 13-14). La rezulto estis la redakto de du malsamaj dokumentoj, kiuj estis aprobitaj en 1966, tamen ne ekvalidis ĝis 1976, kiam 35 ŝtatoj aliĝis al la Paktoj (la nombro estis sendepende atingita por ambaŭ en la sama jaro).

Kiel juraj tekstoj, principe devigaj por la subskribintaj ŝtatoj, la artikoloj de la Paktoj grave nuancas la Deklaracion. Ekzemple, dum la artikolo 3 de la Deklaracio deklaras la rajton je vivo, la artikolo 6 de la Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj toleras mortpunon, sed aldonas iujn limigojn. Tial por homrajta aktivulo gravas konatiĝi kun ili. Nuancoj pri homaj rajtoj montriĝas multaj, multegaj.

Tamen la ĉefa problemo de tiuj Paktoj estas, kigrade ili mem ne estas simplaj deklarioj, malgraŭ ties proklamitaj celoj. Ekzemple, al la Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj aliĝis ŝtatoj, kiuj nuntempe suferas diktaturojn aŭ aŭtoritatismajn reĝimojn. La enkonduka eseo prezentas bildon de konstanta progreso en la internacia instrumentaro por protekti homajn rajtojn.



Ĝi montras la aperon de pli kaj pli da internaciaj traktatoj, ĉu kadre de Unuiĝintaj Nacioj, ĉu de regionaj organizaĵoj, kaj ankaŭ de diversaj internaciaj kortumoj. Tamen tio ne malhelpis genocidojn en Ruando kaj Bosnio komence de la 90aj jaroj.

En tute alia skalo, rimarkindas la nune brulanta kazo de Katalunio (1), kiu deziras efektiviĝi la rajton je memdeterminado. Temas pri rajto proklamata por “ĉiuj popoloj” en la du Paktoj. Ĝin oni konsideras sufiĉe grava, por ke ĝi staru unualoke en ambaŭ kaj estu ilia sola komuna artikolo. Tamen, kvankam Hispanio subskribis ambaŭ dokumentojn, tiu rajto ne estas efektivigebla en Katalunio, kie tre klara plimulto de la loĝantaro volas ĝin realigi pere de referendumo. Male, la hispana registaro uzadis perforton kontraŭ pacemaj voĉdonantoj kaj nuligis la aŭtonomion de Katalunio; hispanaj tribunaloj malliberigis aktivulojn kaj politikistojn kaj cenzuris informajn retejojn antaŭ la senageco de la internaciaj agantoj, kiuj supoze devus garantii la plenumon de la internaciaj traktatoj. Fakte ne la unuan fojon en Hispanio la aŭtoritatoj krude malobservas la landan kaj internacian leĝarojn, tre verŝajne konsciante, ke la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj verdiktos kontraŭ ili nur multajn jarojn poste. Cetere, la kazo de la eŭska ĵurnalo *Egunkaria* estis raportita en la paĝoj de *Monato*. (2)

Bedaŭrinde Hispanio ne estas unikaĵo en la mondo. En la lasta jardeko ni vidis en diversaj eŭropaj landoj, kie supoze homaj rajtoj estas pli bone protektataj ol aliloke, la kreskon de aŭtoritatismo, klaran limigon de la sendependeco de la tribunaloj kaj eĉ de la amaskomunikiloj. Tiel okazas, je malsamaj niveloj, en Hispanio, Hungario, Pollando, Rusio kaj Turkio. Kaj ni ne parolu pri la novliberalisma bakĥanalio, kiu draste faligas la socialajn kaj ekonomiajn rajtojn de milionoj da homoj, malgraŭ ilia laŭdira protektado fare de, interalie, la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj. Ni vivas en tia epoko, kie la plej potenca ŝtato de la mondo regas rasisto; kie tia ŝtato, kia Saud-Arabio, estis elektita al la komisiono pri la rajtoj de virinoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝia reprezentanto fariĝis prezidanto de komisiono de la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN; kie sklav-komercado denove disfloras en Libio kaj aliloke; kie dekoj da miloj da rifuĝpetantoj dronas en Mediteraneo; kie oni okazigas vican genocidon antaŭ la senageco de la mondo, ĉi-foje en Mianmaro (jes ja, ne subskribinto de la Paktoj); ktp.

Pro tio, la sufiĉe optimisma prezento de prof-ino *Urueña*, kvankam ĝi ne kaŝas la mankojn de la sistemo, min impresis tro bonvolema pri internaciaj

strukturoj prezentantaj pli ol evidentajn problemojn. Ili en la lastaj du jardekoj, kaj aparte en la lasta, montriĝas nekapablaj kontraŭstari regreson de la civitanaj rajtoj en multaj landoj.

Ĉiel ajn, malgraŭ tiuj sedoj, kaj la enkonduka eseo kaj la tuta broŝuro estas nediskuteble valoraj, legindaj kaj studindaj. Mi rekomendas ilin. **HAI F**

Fundamento de la homaj rajtoj. Roterdamo: Universala Esperanto-Asocio, 2016. 96 p.

Noto:

- (1) En 2012, **Etnismo** n-ro 90, aperis artikolo de Hektor Alos i Font, «Katalunio, ĉu nova ŝtato de Eŭropo?», pri la ampleksiĝinta sendependisma movado en Katalunio. Eblas ĝin legi en www.etnismo.org/arkivo/Etnismo_90.pdf (N.d.r.).
- (2) Pri la fermo de la eŭsklingvaj ĵurnaloj *Egin* (1988) kaj *Egunkaria* (2003) raportas Hektor Alos i Font, «Maljusta justico» en **Monato** 2010, <http://www.esperanto.be/fel/2010/010065.php> kaj «Kiam arestoj “pruvas” terorismajn ligojn» **Monato** 2003, <http://www.esperanto.be/fel/2003/008082.html>.

KONCIZE EL ...

Gvineo-Bisaŭo. La kiriola disvastiĝas. Lando de okcidenta Afriko, eks-portugala kolonio sendependa de 1973, Gvineo-Bisaŭo havas malpli ol du milionojn da loĝantoj sed dudekon da lingvoj. La portugala ludas oficialan rolon, sed jam delonge ekzistas portugal-bazita kreolo, la kiriola. Dum la unuaj jardekoj de tiu respubliko, elituloj emis uzi la portugalajn, sed nun la kiriola aŭdiĝas multe pli, eĉ en la ministrejoj. Ne nur en la ĉefurbo Bisaŭo infanoj tre frue iĝas dulingvaj, uzante sian afrikan lingvon kaj la kiriolan. En lernejoj la portugala estas teorie la sola uzata lingvo, tamen instruistoj pli malpli kaŝe uzas la kiriolan por esti komprenataj. Kaj tiu lingvo, unue nur parolata, pli kaj pli skribiĝas. Ĝi havas ankaŭ oficialan statuson, sed nur regionan. Ŝajnas, ke apenaŭ 12 % de la loĝantoj havas bonan konon de la portugala, kaj tiu procento ne emas kreski. Jam en detala raporto al Unesko pri la enlanda lernejsistemo (2013), la ministrejo pri edukado diskrete aludis al tiu malfacila lingva situacio, sen proponi plibonigojn. **AF**

Alĝerio. Kabilio ekbolas. Tradicie ribelemaj, kabiloj manifestaciis plurfoje dum la jaro 2017, rekte postulante sendependiĝon de Kabilio el Alĝerio. La duan de februaro, la tagon de la gepatra lingvo, policistoj sukcesis disigi demonstraciantojn, sed tiuj ĉi

rekuniĝis la 21an de la sama monato en la urbo *Imceddalen*. Kelkaj estis arestitaj, sed rapide liberigitaj. La 16an de aprilo manifestacio okazis en Parizo kaj la 20an en *Tizi-Ouzou*, la kabilia ĉefurbo, kie defilis verŝajne plurmiloj da homoj (facilas trovi videojn sur la reto). Tion organizis MAK (*Mouvement pour l'Autodétermination de la Kabylie*, movado por memdeterminado de Kabilio), tutcerte la plej potenca el pluraj organizoj samcelaj. Decembre kreiĝis URK (*Union pour une République Kabyle*, unuiĝo por kabila respubliko), kiun iuj konsideras ilo de la ŝtataj sekretaj servoj por kontraŭstari al MAK, tiom pli, ke tiu strukturo ne fariĝis penetrebla por ili. Entute la alĝeria registaro, estrata de olda kaj tre malsana (de longe ne plu videbla) prezidento, ne scias kiel reagi, fronte al tiom da malkontento socia, ekonomia kaj kultura. Interalie la oficialigo en 2016 de la tamaziga (lingvo de kabiloj) havis ĝis nun nenium konkretan sekvon. **AF**

Birmo. Rohingjoj amase fuĝis el la lando dum la lastaj monatoj. Forpelitaj de sia hejmo, se ili evitis esti masakrataj, rohingjoj devis forlasi Birmon kaj rifuĝi en apudaj landoj, ĉefe Bangladeŝo, en teruraj kondiĉoj. Ŝajnas, ke inter aŭgusto kaj decembro tiu formigrado koncernis almenaŭ 620 000 homojn. Bud-

histaj birmanoj konsideras ilin etne kaj religie nekongruaj kun ilia lando – strange, ĉar tiu ĉi entenas multajn etnojn kaj plurajn religiojn (interalie aliajn islamajn grupojn). Oni ne multon scias pri la deveno de la rohingjoj, sed plej multaj birmanoj opinias, ke ili alvenis de Bengalo pro decido de la brita kolonia potenco fine de la 19a jarcento kaj tial ne meritas birman civitanekon. Ŝajnas tamen, ke ili estis en la sud-okcidenta parto de la lando (la nuna ŝtato Arakano, angle *Rakhine*) jam antaŭ jarcentoj. La konflikto ja komenciĝis la 25an de aŭgusto per atako de policejoj fare de la Rohingja Sav-armeo, kiu defendis la rajtojn de sia minoritato, sed la reago de la birma armeo estis eksterproportia tiom pli, ke misagoj kontraŭ-islamaj okazas delonge. La pasiva sinteno en tiu konflikto de la Nobel-premiito pri paco *Aung Sang Suu Kyi*, faka konsilantino kaj proparolanto de la birma prezidento *Htin Kyaw*, skandalis grandan parton de la internacia publika opinio. AF

Svislando. Usonaj indianoj manifestacias okupante la lokalojn de la banko *Crédit Suisse* en Ĝenevo. La 6an de junio ili profitis eŭropan turneon por denunci la partoprenon de tiu banko en la financado de la naftodukto *Dakota Access* (vidu *Etnismo* n-ro 98, p. 19), kies konstruo okazos pro subteno de la usona registaro. Jam okazis informlikoj, sed pri tio oni fajfas en lando, kie ekologiaj aspektoj tute ne plu konsideratas, almenaŭ pinte de la administracio. Kaj samtipa problemo okazas iom pli norde, en Kanado, kie aliaj indianoj luktas kontraŭ la konstruo de naftodukto de la entrepreno *Kinder Morgan*, jam aprobita de la ĉefministro *Justin Trudeau*. Ĉu lando subskribis aŭ ne tutmondajn interkonsentojn pri klimato kaj respekto al indiĝenoj ŝanĝas nenion, kaj ĉiam oni facile trovas bankojn por financi eĉ la plej fiajn projektojn kontraŭhomajn kaj kontraŭnaturajn. AF



INFORMILO 79

**Internacia
komitato
por
Etnaj
Liberecoj,
Honora prezidanto:
Uwe Joachim Moritz**

IKEL en la 102a Universala Kongreso

Rafael Blanco deĵoris ĉe la budo de la Movada Foiro, okazinta en la parko de la Fremdlingvofaka Universitato en Seulo. Li rakontis la kutimajn bataletojn por respektigi sian anguleton en tia plenplena kaj plenviva Foiro. Finfine la budon, ĉirkaŭ gaja kaj varma etoso, ĝuis kongresanoj, kiuj interesiĝis pri IKEL, prenis informfoliojn kaj aĉetis ekzemplerojn de *Etnismo*. NM

IKEL en la 10a Forumo pri Minoritataj Aferoj

Ĵaŭde, la 30an de novembro kaj vendrede, la 1an de decembro la teamo reprezentanta Universalan Esperanto-Asocion ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo ĉeestis la 10an Forumon pri Minoritataj Aferoj. De du jaroj du membroj de la estraro de **IKEL**, *Alain Favre*, prezidanto, kaj mi mem, *Nicole Margot*, apartenas al tiu teamo, gvidata de *Stefano Keller*, kun *Cesco Reale* kaj *Adrian Tanner* kiel aliaj membroj. (1)

Jam dufoje mi raportis pri pli fruaj sesioj de tiu forumo. En mia unua raporto (*Etnismo* 84, 2009, p. 35-37) mi detalis la historion kaj la funkcion de tiu forumo, en kiu NeRegistaraj Organizaĵoj (NROj) reprezentantaj minoritatojn povas esprimiĝi same kiel la UN-membroŝtatoj.

Mi rememorigu, ke tiu ĉi forumo okazas ĉiujare laŭ la decido de la Konsilio pri Homaj Rajtoj per rezolucio adoptita la 28-an septembron 2007: «La Forumo rolas kiel platformo por instigi al dialogo kaj al kunlaboro pri minoritatanaj temoj kaj por listigi la plej bonajn praktikojn kaj solvojn cele al pli bona respekto de la naciminoritataj rajtoj.»

La sama rezolucio petas al la prezidanto de la Homrajta Konsilantaro nomumi por ĉiu sesio foruman prezidanton el inter la ekspertoj pri minoritataj aferoj. Ĉi-jare, en 2017, S-ro *Tarik Kurdi* el la Respubliko Sudano prezidis la forumon. D-ro *Fernand de Varennes*, (2) speciala raportisto de UN pri Minoritataj Aferoj, pretigis la kunvenon kaj raportos pri la enhavo de la Forumo al la Homrajta Konsilio dum ties 37a sesio en marto 2018.

La temo de tiu ĉi lasta sesio estis aparte interesa: **Junularo el minoritatoj: al diversecaj kaj inkludaj socioj**. En siaj prepardokumentoj la organizantoj esperis, ke la juna generacio ĉeestos kaj partoprenos en la diskutoj, alportante konkretajn rekomendojn. Kaj ni povis konstati, ke ja la gejunuloj plej multas en la salonego.

La temo estis traktata en kvar debatkunvenoj. Sed malfacilas debati kun ĉirkaŭ 400 partoprenantoj. La speciala raportisto, d-ro *de Varennes*, ja provis plibo-

nigi la funkciadon de la debatoj per pretiga kunveno antaŭ la forumo. Ĉiu debat-kunveno komenciĝis per kvin-minuta prezento de ekspertoj pri minoritatoj, kaj poste la alparolantoj, kiuj levis la manon en la salono por esti listigitaj de deĵoranto promenantaj inter la seĝvicoj, ricevis nur du minutojn. Tio malmultas, kiel plendis alparolanto: «Unuafoje ni rajtas veni al ĉi tiu forumo, en nia lando ni ne rajtas esprimiĝi, kaj ĉi tie vi donas al ni nur du minutojn da parolado!»



Foto de la aŭtoro.

La alparolantoj levas la manon kaj deĵoranto promenas inter la seĝvicoj por kolekti la parolpetojn.

Tial ofte la reprezentantoj de minoritatoj preferis uzi tiujn du minutojn por prezenti sian malfacilegan situacion ol por vere debati laŭ la temoj. Ofte ili estis interrompitaj meze de frazo ĉar ili preterpasis la atribuitan tempon. Kruele, sed necese, por ebligi al ĉiuj esprimiĝi, celo, kiu eĉ neniam estis atingita. Oni tamen instigis la alparolantojn respekti la temon kaj sendi pli longajn prezenttekstojn, kiuj estus afiŝitaj en la retpaĝoj de la forumo (kaj sur la koncerna Vizaĝlibra paĝo). Eble tial mi ne vere povos raporti pri la maniero, laŭ kiu estis traktitaj la kvar subtemoj, sed raportos nur pri la ĝenerala etoso, pri impresoj kaj pri kelkaj eventoj. Mi tamen listigos la 4 subtemojn:

- Ĵaŭde matene: **«Inkluda edukado por doni al junuloj el minoritatoj rimedojn por sukcesi.»**
- Ĵaŭde posttagmeze: **«Partopreno de la junuloj el minoritatoj en la publika vivo.»**
- Vendrede matene: **«La junuloj el minoritatoj kaj la interreta erao. Akcepto kaj perspektivo.»**
- Vendrede posttagmeze: **«La junuloj el minoritatoj, agantoj de ŝanĝo por paco kaj stabileco.»**

La prezidanto ofte ripetis, ke la alparolantoj devas respekti la temon, uzi “taŭgajn” vortojn kaj eviti insultojn. Mi devas konfesi, ke dum mia aŭskultado, kiu estis sufiĉe atenta kaj kovris la du tagojn, mi neniam aŭdis insultajn vortojn de la reprezentantoj de minoritatoj. Sed, kiel jam dirite, multaj alparolantoj profitis la okazon por plendi pri siaj ŝtatoj ne respektantaj iliajn rajtojn. Foje ili eĉ akuzis, kaj tiam oni aŭdis sekan brueton, ĝis la alparolanto estis interrompita. Iu malkontenta reprezentanto de la akuzita membroŝtato frapis la randon de sia pupitro pere de sia plastizita nomŝildo iom rigida. Tio signifis,

ke la “akuzita” ŝtato submetis proceduran demandon. Kaj tiel ĉiu ŝtato rajtas interrompi civitanon, kiu “akuzas” ŝtaton aŭ tute simple ne esprimiĝas laŭ ties linio. La submetanto diras, ĉu ke la akuzoj mensogas, ĉu ke la alparolanto ne traktis la temon kaj devas esti silentigita. Malgraŭ la submeto ĉiu alparolanto interrompita rajtis fini sian duminutan tempoparolon poste, sed la prezidanto admonas por ke oni respektu la temon kaj ne insultu.

La plej frapa ekzemplo de simila evento estis alparolo de virino el la Ogadena regiono, kiu skrupule respektis la temon asertante, ke la partopreno de la gejunuloj al la publika vivo renkontas multajn obstaklojn flanke de la etiopia registaro. Ŝi ne povis fini la unuan frazon, kiam oni aŭdis frapon per nomŝildo. La reprezentanto de Etiopio postulis, ke ne estu en tiu ĉi forumo «politikaj deklaroj», sed nur «pozitivaj kaj konstruaj dialogoj», ke la organizantoj ne devus akcepti en la forumo organizojn teroristajn kiel tiu, kiu ĵus esprimiĝis. La prezidanto de la Forumo respondis, ke la listoj de partoprenantoj estas zorge kontrolitaj, ke ne estas teroristaj asocioj, kaj li petis, ke la membro-ŝtatoj ne interrompu alparolantojn, kiuj ne uzas insultojn. Tiam la virino povis fini sian paroladon.

Tuj poste la reprezentanto de Aŭstrio alparolis por plu substreki, ke la insultoj ja ne estu tolerataj sed ke debatanto, kiu donas konkretajn ekzemplojn ne devas esti interrompita. Li ricevis aplaŭdojn.

Je la posttagmezfinna konkludo, la moderiganto, s-ro Mina *Thabet*, senkulpiĝis, unue ĉar ne ĉiuj kiuj deziris povis esprimiĝi, sed ankaŭ pro la tro ofta interrompo far reprezentantoj de membroŝtatoj.

Frapis min, ke pluraj reprezentantoj de minoritatoj el Irano plendis pri kompleta malrespekto de la tieaj minoritatoj, kurdoj, turkmenoj, sunitoj, arablingvanoj ktp, pri absoluta rego de la nura persa lingvo en tiu lan-

do, kvankam la konstitucio ebligas edukadon en la minoritataj lingvoj. La alparolanto aludis pri malamo al la sunitoj jam ekde la regno de la ŝaho kaj mirigis min dirante, ke la araba lingvo estas konsiderata kiel barbara. Mi miris ĉar, estante la lingvo de la Korano, la araba normale ne devus esti malestimata de islamanoj.

En mia raporto de 2009 mi rimarkigis, ke neniuj minoritato el Eŭropo esprimiĝis, sed ĉi-jare bretonoj kaj savoĵanoj plendis pri la neratifo far Francio de la Ĉarto pri la Minoritataj Lingvoj, kaj grupoj el Veneto kaj el la regiono de Triesto plendis, kvankam ne tre klare, pri malrespekto de iliaj rajtoj flanke de la itala registaro.

NM

Notoj:

- (1) Mi ne raportos ĉi tie pri la deklaro de esperantistoj (UEA). Pri tio vi povas konsulti la retejon:

<http://www.linguistic-rights.org/eventoj/eventoj.html#MF10>

- (2) <http://www.linguistic-rights.org/fernand-de-vareennes/>

IKEL en la 8a Scienc-kongreso che UN

Ĉe UN en Ĝenevo okazis de la 11a ĝis la 13a de decembro la 8a Scienc-kongreso de la Internacia Scienca Akademio *Ararat*. *Alain Favre* partoprenis ĝin la 12an de decembro, kiel membro de la UEA-teamo en Ĝenevo. Temis pri sesio pri lingva diverseco, scienca progreso kaj daŭripova evoluo. La alparoloj estis diversaj kaj interesaj, precipe pri novaj metodoj por plivigligi uzon de minoritataj lingvoj, plivastigon de ties kulturoj kaj pozitivajn influojn al la vivmedio. La rondaj tabloj tamen estis tro « rondaj », iom limigitaj al la prelegantoj. Sed oni ĉiam povas lerni el tiuj renkontiĝoj, kaj eĉ tiu ĉi numero de Etnismo estas parte influita de tiu evento.

AF



Fotis Nicole Margot.

Lasta rigardo al la kalankoj de Tursi.